

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2020. №2



Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2020. №2 (304)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas nur elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiusezone. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj: Paweł Fischer-Kotowski (vicedaktoro), Peter Baláž, István Ertl, Irina Gonĉarova, Povilas Jegorovas, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajevo, Sergio Pokrovskij

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

Retejoj: <http://esperanto-ondo.ru>, <https://sezonoj.ru>

Abontarifo por 2020

Abonanto: 15 eŭroj, 17 usonaj dolaroj, 60 zlotoj, 850 rubloj

Amiko: 30 eŭroj, 33 usonaj dolaroj, 120 zlotoj, 1700 rubloj

Patrono: 100 eŭroj, 110 usonaj dolaroj, 400 zlotoj, 5500 rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2020, №2 (304).

Ежеквартальный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 1 июля 2020 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Redakcie	5
Temo	6
Stanislav Belov. La lecionoj de la pandemio	7
Paulo Sérgio Viana. Kronviruso en Brazilo	11
Aleksander Korĵenkov. Malgaja statistiko, tri monatojn poste	13
Eventoj	14
MondaFest' 2020: UN salutis (parte) en Esperanto	15
MondaFest' 2020: La unua semajno	15
Virtuala Kongreso de Esperanto: jam eblas aliĝi	15
Sonja Zaretskaia. Somera Esperanto-Studado 2020: virtuale kaj tutmonde ...	16
Margarita Želve. BET-56 okazos en Jelgava post unu jaro	17
Przemysław Wierzbowski. SAT-kongreso – unuafoje interreta	17
Somera Esperanto-Programado 2020	18
Estu volontulo en Tuluzo	18
KER: Ekzameno malgraŭ la pandemio	19
Malvirtuale en Kultura Centro Esperantista.	20
Sonja Zaretskaia. Poliglotoj kunvenis virtuale kaj rekorde.	21
Giorgio Silfer invitita por prezidi en Hungario	22
Petro Zilvar, Zsófia Kóródy. La Esperanto-urbo Herzberg denove invitas.	23
Venu ĉi-somere al la Esperanto-kastelo Greziljono.	25
Estraro de TEJO 2020-2021: Jen la kandidatoj	26
Nova estraro de Institucio Hodler	27
La Fondaĵo Grabowski: nova juĝkomisiono.	27
TEO: nova kunlaboranta faka asocio de UEA.	28
Skoltismo: Senpaga aliĝebleco al SEL	29
UN lanĉis enketon. Ankaŭ en Esperanto.	29
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Ni funebras kaj kondolencas	30
Tribuno	31
Michal Matúšov. Pliefikigu vian tempouzadon – plene en Esperanto	32
Michal Matúšov. Neniu ligilo tro longa por Mallonge.net	34
Estrara respondo al la plendoj: Komunikado de la Akademio de Esperanto	36
Valentin Melnikov. Respondo.	36
Mesaĝo de UEA okaze de la Monda Tago de Rifuĝintoj	37
SAT perdis dekonon de la membraro en 2019	38
Riichi Karibe. Rezolucio pri la pandemio kaj ties influo al Esperanto	38

Leterkesto (Georgi Mihalkov, Luis Ladeira, Stanisław Polanowski, Paulo Sérgio Viana).....	39
Arkivo	40
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en julio 2020.....	41
Marie Hankel. La hejmveturado.....	43
Aleksander Korĵenkov. Notoj de la editoro	49
Kulturo	51
Paweł Fischer-Kotowski. Ĵak Le Puil kvaroble dudekjara! Intervjuo kun Ĵak Le Puil	52
Paweł Fischer-Kotowski. Trevor Steele: La internacia lingvo estas parto de mia ideologio. Intervjuo kun Trevor Steele	54
Aleksander Korĵenkov. Kvardek jaroj de (ne nur) Klim Samgin.....	58
Maksim Gorĵkij. La vivo de Klim Samgin: Romanfragmento (Trad. Aleksander Korĵenkov).....	59
Miĥail Korotkov. Diman	78
La 53a programo de Radio Esperanto	82
Laure Patas d'Illiers. Rufa	83
Paulo Sérgio Viana. Mi ne havas horloĝon.....	86
Literatura konkurso "Ĥristo Gorov – Ĥrima 2020"	87
Luisa Castro. "Mia patrino laboras en enladigejo..." (Trad. Suso Moinhos).....	88
Cesare Pavese. "Si parva licet" (Trad. Carlo Minnaja).....	89
Wolfgang Kirschstein. La arĝenta ekrano en la salono	96
Valentin Melnikov. Rikolto la sepan fojon (Recenzo: <i>Belarta rikolto 2019</i>).....	99
Georgi Mihalkov. <i>Ni vivos!</i> aperis en la korea lingvo	100
Halina Gorecka. Du almanakoj.....	101
<i>Literatura Foiro, 2020, N°304</i>	103
<i>Literatura Foiro, 2020, N°305</i>	103
Ricevitaj gazetoj	104
Literatura Konkurso 2020: Pandemio – neĉiutaga ĉiutageco	105
Przemysław Wierzbowski. Dramo de Słowacki en nova traduko	106
Pretu tosti PIVE (sed ne nur biere...)	106
Gao Shuyuan. Libro de UN pri KOVIM-19 aperis ankaŭ en Esperanto	107
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. <i>La Ondo de Esperanto</i> : duonjaro da ĉiutaga informado	108

Sur la kovropaĝo estas unu el la parizaj pentraĵoj de Maria Baŝkirceva (1860-1884), kiu dum sia tro mallonga vivo kreis pli ol 150 pentraĵojn, muzikis, kantis, parolis plurajn lingvojn kaj ekde sia 12-jara aĝo skribis sian taglibron, daŭre tradukatan kaj reeldonatan.

Redakcie

Ekde januaro 2020 *La Ondo de Esperanto* aperas dumaniere: unue, kiel ĉiutage aktualigata novaĵretejo; due, kiel trimonata almanako, en kiu estas publikigataj la plej gravaj tekstoj el la novaĵretejo kaj ankaŭ artikoloj, eseoj kaj beletraĵoj, verkitaj speciale por la almanako, kiu konservis la faman nomon *La Ondo de Esperanto*. La unua, printempa (laŭ la nordhemisfera vidpunkto) almanako aperis la unuan tagon de aprilo, kaj en la 39a paĝo vi povas legi kelkajn opiniojn pri ĝi.

Malkiel la retejo, kiu plu estas libere legebla de ĉiu deziranto, la almanakon ricevas nur tiuj, kiuj abonis ĝin. Estas tri abonkategorioj:

1. Abonanto – 15 eŭroj
2. Amiko – 30 eŭroj
3. Patrono – 100 eŭroj

Pri la pagomanieroj legu ĉe <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

La nomoj de ĉiuj amikoj kaj patronoj aperas en la rubriko “Donacoj” de nia retejo kaj en la almanako (krom tiuj, kiuj preferas resti anonimaj). Ĉiu patrono ricevos diplomon de la redakcio, senpagan bitversion de ĉiu nova libro de *Sezonoj* kaj 50-procentan rabaton por ĉiu nova papera libro.

Je la 30a de junio 2020 estas registritaj du patronoj kaj dek amikoj de *La Ondo de Esperanto*:

Patronoj (100 eŭroj)

Syôzi Nobuyuki (Japanio)
István Ertl (Luksemburgio)

Amikoj (30 eŭroj)

Claude Glady (Belgio)
Jean Bizet (Francio)
Marielle Martin (Francio)
Werner Pfennig (Germanio)
Anonima (Madrido, Hispanio)
Gražina Opulskienė (Litovio)
Bård Hekland (Norvegio)
Aleksej Garkovenko (Ruslando)
Daniel Gubler (Svislando)
David Henderson (Usono)

Koran dankon al ĉiuj subtenantoj!

Halina Gorecka
Aleksander Korĵenkov

Temo



La koronavirusa epidemio virtualigis la socian vivon en la urboj kaj malplenigis la stratojn eĉ en Novjorko. (Foto de Aaron Barlow https://commons.m.wikimedia.org/wiki/File:Times_Square_empty.jpg, CC BY 2.0)

Lecionoj de la pandemio

de Stanislav Belov

Venkinte la svedan reĝon Karolon la 12an en la pli ol dudekjara Nordia milito, Petro la Granda nomis lin sia instruisto. Kaj tio estis ne nuraj belaj vortoj, sed agnosko de la fakto, ke nome tiu ĉi sangoverŝa milito naskis kaj forĝis la Ruslandan Imperion. La tutmonda milito kontraŭ la kronviroza pandemio daŭras, sed jam tempas demandi – kion instruis al ni tiu ĉi katastrofo? Ni lasu medicinajn konkludojn al la sciencistoj kaj koncentriĝu je konkludoj sociaj kaj politikaj.

Malegaleco mortigas

Tio estas eble la plej granda leciono de la pandemio. Se antaŭe oni povis diskuti pri avantaĝoj kaj malavantaĝoj de la socia egaleco kaj mediti, ĉu ĝi spronas la konkuradon kaj stimulas imagipovon, aŭ subpremas la marĝenulojn kaj bremsas la ekonomion, nun la konkludo klaras – la socia malegaleco mortigas.

Tio speciale forte sentebblas en la landoj, kie riĉeco kaj malegaleco kunestas – kiel en Usono, kie pro la kronviruso jam mortis 124 mil homoj. Oni povas skrupuli pri kalkulmetodoj, kiuj malsamas tra la mondo, kaj fanfaroni pri malfermiteco de la datumoj kiel signo de demokratio, sed apenaŭ dubindas, ke al apero de amastombejoj kaj kadavrofridujoj en Novjorko grave kontribuis la fakto, ke 28 milionoj da homoj en la plej potenca lando de la mondo ne havas aliron al la medicinaj servoj pro manko de sanasekuro.

Oni asertis, ke ĉiuj egalas antaŭ la plago, sed tio evidentiĝis malvera. Dum bonhavuloj plezure pasigis kvarantenajn tagojn en siaj komfortaj hejmoj, uzante liverservojn por plu ricevi ĉion necesan, kaj lanĉis plurajn amuzajn konkurojn en sociaj retejoj, enuante pro neniofarado, la malriĉuloj frontis malfacilan elekton inter sano kaj vivo unuflanke kaj ekstrema mizero, malkapablo pagi kreditojn kaj foje eĉ malsato aliflanke. En Barato policanoj bastonis homojn surstrate, sed tio apenaŭ efikas ĉe malsatuloj.

Cetere al tiu aro da malobeemuloj aliĝis ankaŭ milionoj da etaj entreprenistoj, kies negoco kutime ne havas rezervojn, simile al biciklado, kie la sola elekto estas pedali aŭ fali. Mi ne kondamnis mian friziston, kiam li agnoskis kaŝe labori la tutan kvarantenon. “Kiu nutros miajn du infanojn kaj pagos hipotekon? – li klarigis. – Mia edzino negocis en turismo, do imagu ŝian komercon nun”.

Cetere mortigas ne sole manko de alireblo al la medicinaj servoj, sed pluraj trajtoj de la malriĉula vivo: abundo de kronikaj malsanoj (trodikeco, diabeto, ftizo), malsana vivstilo (alkoholismo, drogoj, fumado, malsalubraj nutraĵoj), neglekto de preventado pro manko de edukado ktp.

Ĉio ĉi estas pagata per vivoj. En Usono nigruloj mortas pro la kronviruso almenaŭ 2,5-oble pli ofte ol blankuloj – el ĉiuj 100 mil reprezentantoj de respektiva rasa grupo pro COVID-19 mortis 50,3 nigruloj, 20,7 blankuloj, 22,9 latinamerikanoj kaj 22,7 azianoj. Certe tio almenaŭ parte klarigas, kial plia murdo de senarmila nigrulo fare de polico eksplodigis la socion. Feliĉe por la usona elito temas pri ribelo sen gvidantoj kaj klara ideologio, do granda parto de ĝia energio konsumiĝis per sen-sencaj agoj, kiel disrabado de vendejoj kaj detruado de monumentoj.

Tamen la sonorilo alarmas ĉiam pli laŭte – se malegaleco plu kreskos, la malavantaĝuloj, kiuj senhalte multiĝas, ribelos denove kaj postulos sian parton de la nacia riĉaĵo. Oni povas moki kaj ignori indignulojn rabantajn luksajn butikojn. Sed, se morgaŭ aperos politika forto, kiu armos ilin per ideologio kaj montros veran celon – la teruraĵoj de la 11a de septembro ŝajnos nura venteto kompare al tiu ĉi uragano.

Socia solidareco ne efikas

La usona epidemiologo Sonia Shah asertas, ke la epidemioj naskis la homan socion, ĉar fronte al tiu nevidebla, sed morte danĝera minaco la unuaj homoj devis unuiĝi en grupoj kaj kontraŭstari al la fremduloj kiel eventualaj kontakantoj. Eble ŝi pravas, sed necesas memori ke tiutempaj socioj estis egalismaj, dum ni vivas en la epoko, kiam la socio ĉiam pli fendiĝas, kaj inter plejaj riĉuloj kaj malriĉuloj etendiĝas abismo.

Ĉu la katastrofoj stimulas socian solidarecon super ĉiuj klasaj barieroj? Bedaŭrinde, la respondo estas negativa. La vivo plian fojon konfirmis la malnovan rusan proverbon: “Por iu – milito, por alia – profito”. Dum miliardoj da homoj streĉis ĉiujn fortojn por elturniĝi kaj samtempe ne pereigi sin mem kaj la familianojn, la plejaj riĉuloj iĝis nur pli riĉaj. En Usono, fama pro siaj bonhavo kaj socia malegaleco, kapitaloj de 600 miliarduloj dum la dumonata tutlanda kvaranteno (de la 18a de marto ĝis la 19a de majo) kreskis je 15% – de 2.948 ĝis 3.382 trilionoj da dolaroj.

Oni povas fantazii pri la socia solidareco, sed la historio montris, ke ĉio ĉi estas nuraj fabeloj aŭ marĝenaj sociaj fenomenoj, kiel bonfarado fare de filantropoj. La papo Leono la 13a eldonis la unuan enciklikon, dediĉitan al tiu ĉi problemo, en 1891 kiam la kapitalisma mondo komplete formiĝis, kaj nomis ĝin Rerum Novarum (Pri Novaj Aferoj). La aferoj jam malnoviĝis, sed la proponitaj kuracmetodoj ne efikis.

Iuj naivuloj plu esperas, ke la bonhavuloj bonkore kundividos sian sukceson kun la malavantaĝuloj – ĉu pro kristana (islama, juda, humanisma ktp) kompato, socia solidareco aŭ sento de propra sekureco. Tamen la vivo montras malon. Dum la pandemio 50 plejaj riĉuloj donacis por lukto kontraŭ la plago kaj ties sekvoj preskaŭ unu miliardon da dolaroj. Ĉi tiu nombro impresas, sed por kompreni la datumojn, necesas meti ilin sur respektivan fonon, kio ofte draste ŝanĝas la bildon. Se kompari tiun ŝajne gigantan donacon kun la totala kapitalo de tiu ĉi kvindeko, ni vidos ke ili oferis nur 0,1% de siaj riĉaĵoj. Tio jam malpli impresas, ĉu ne?

Ĉio iĝas eĉ pli klara, se kompari tion kun havaĵoj kaj donacoj de la averaĝa usona familio. Ekzemple Jeff Bezos, la posedanto de “Amazon”, donacis 125 milionojn el siaj 143 miliardoj, kio egalas al donaco je 85 dolaroj fare de averaĝa usona familio. Sendube multaj ordinaraj usonanoj oferis en tiu periodo eĉ pli ol 85 dolarojn, sed iliaj nomoj ne videblas sur gazetaj frontpaĝoj, ĉu ne? Post tio restas nur aldoni, ke triono da usonaj miliarduloj anoncis neniujn oferojn.

Oni povas fascini pri la inventemaj ĉarmuloj kiel Elon Musk, kiu lanĉas raketojn al kosmo, kreas unikajn elektrajn aŭtojn kaj promesas enloĝigi Venuson – kaj ĉio ĉi kompreneble por progeso de la scienco kaj prospero de la homaro. Sed ne forgesu ke dum la kronviruso rikoltis ĉiutage milojn da mortoj en Usono, la sama Elon Musk rifuzis fermi sian fabrikon en Kalifornio kaj eĉ sendis prian plendon al la prezidanto Donald Trump. Kaj tion faris la homo, kies kapitalo dum la kvaranteno kreskis je rekordaj 48% kaj atingis 36 miliardojn da dolaroj!

La posedaĵo similas al la magia ringo el la trilogio de Tolkien – nur ege malmultaj kapablas rezisti la forton de ĝia tento. Se ni deziras pli sekuran mondon, ni ne atendu miraklojn, sed ŝanĝu la tutan sistemon – tio estas la dua leciono de la pandemio.

Dum ĉiu krizo, ankaŭ dum la koronavirusa krizo, plej suferas malriĉuloj, kiel la senhejmulo en Novjorka strato, fotita de Anthony Quintano https://commons.m.wikimedia.org/wiki/File:Homeless_Man_On_New_York_City_Street_Corner_During_COVID19_Quarantine.jpg (CC BY 2.0)



Amaskomunikiloj misinformas

Ŝajne la grandega evoluo de komunikaj teknologioj ebligis ricevadon kaj komparadon de abundaj informoj el plej diversaj fontoj, kio devus stimuli objektecon de la amaskomunikiloj kaj informitecon de la amasoj. Sed la realo estas mala – nek la amaskomunikiloj informas, nek la amasoj informiĝas.

Evoluo de la kapitalisma ekonomio neeviteble ŝanĝis ankaŭ la gazetaran medion – la plej influaj gazetoj, novaĵagentejoj kaj televidkanaloj koncentriĝis en la manoj de kelkaj konzernoj, kapablaj trudi sian pensmanieron al miliardoj da homoj.

Do anstataŭ prepari sin al la proksimiĝanta plago usonaj amaskomunikiloj rakontis fabelojn pri la mirinda viruso, kiu trafas nur ĉinojn (poste oni inkluzivis azianojn ĝenerale) kaj do apenaŭ danĝeras por la aliuloj. Poste, kiam la katastrofo jam furiozis en ilia hejmo, la usonaj gazetoj koncentriĝis je interpartia batalado, kies etoso ĉiam pli memorigas pri la enlanda milito.

La ruslandaj amaskomunikiloj, grandparte regataj de la ŝtato aŭ ĝiaj klientoj-oligarĥoj, elektis ne malpli fuŝan strategion. Ili ripetadis oficialajn avertojn pri la danĝero kaj neceso de la preventado ktp, sed samtempe ili publikigis fantaziajn oficialajn raportojn, el kiuj la ordinara homo povis konkludi, ke pro la kronviruso mortas malmultaj kaj ke tio estas precipe aĝuloj kun abundaj kronikaj malsanoj. “Do kiel tio koncernas min?” – oni demandas kun miro kaj iras straten por profiti varman tagon kaj renkontiĝi kun geamikoj, foje en neoficiale funkcia kafejo.

Mia urbo Tjumeno estas tipa ekzemplo de tiu ĉi kontraŭdira konduto, kie rigorajn oficialajn avertojn apudas malstreĉiga oficiala statistiko, laŭ kiu mortintoj malmultas kaj la plej juna el ili havis 54 jarojn. Tio draste kontrastas rakonton de mia amikino, laboranta kiel kuracisto en “ruĝa zono” de provinca hospitalo. Ŝi diris, ke la hospitalo plenas je gravaj malsanuloj, kaj ĉiuj kuracistoj uzas vindaĵojn, ĉar mankas eĉ tempo por ili al necesejo, ĉar tiu viruso trafas jen renojn, jen hepaton, jen pulmojn, kaj lukti kontraŭ ĝi estas ege malfacile. Ŝi mem, aktiva sportistino fortega fizike kaj mense (kio propras al korpokonstruistoj), sendis siajn filon kaj patriron al somerdomo, kaj jam tri monatojn ŝi vidas ilin nur per WatsAp – por ne subigi ilin al la danĝero, kies gravecon ŝi konas tre bone. Rilate la oficialan statistikon ŝi komentis mallonge: “Hodiaŭ mortis 40-jara viro. Ni vidu, ĉu li aperos en la raporto”. Unu monato jam pasis, sed en Tjumeno pro la kronviruso plu mortas nur maljunaj diabetuloj...

Se ni deziras esti vere informitaj, ni bezonas sendependajn amaskomunikilojn. Kiel atingi tion? Mi ne scias. Eble civitana ĵurnalismo kiel Vikinovaĵoj aŭ Tutmondaj Voĉoj estas sekvinda modelo – kombine kun blogoj kaj sociaj retejoj.

Tamen mi certas pri unu afero – por efike lukti kontraŭ la tutmondajn plagojn kiel la kronvirusa pandemio ni bezonas same tutmondajn rimedojn. Kaj tio donas bonan ŝancon al Esperanto kiel lingvo, ebliganta superi limojn de nacia propagando kaj korporacia partio kaj formi mondbildon pli buntan kaj realisman ol tiu prezentata de la ĉefaj amaskomunikiloj. Tio estas la tria leciono de la kronvirusa pandemio. Ĉu ni uzos tiun ŝancon?

Kronviruso en Brazilo

de Paulo Sérgio Viana


En la fino de la jaro 2019 eksonis la unuaj informoj pri la nova kronviruso, en la provinco Vuhano, en Ĉinio. Neniu tiam povus imagi, ke post kelkaj monatoj, jam naŭ milionoj infektiĝos kaj centmiloj mortos en la tuta mondo. Tio estas nek la sola, nek la plej mortiga kaj vasta pandemio en la historio, sed por generacio, kiu neniam travivis ion similan, ĝi estas certe suferiga katastrofo.

En Brazilo la unua rekta kontakto kun la problemo okazis en februaro 2020, kiam aviadilo venigis el Vuhano brazilanojn tie loĝantajn. Ili restis izolitaj, kaj neniu ricevis pozitivan testrezulton pri kontaĝo. Je la 26a de februaro, la unua okazo estis dokumentita en la urbo San-Paŭlo: 61-jara viro, kiu estis vojaĝinta al Italujo. Oni tuj refortigis la kampanjon por prevento per lavado de manoj, frotiĝo per alkoholo, k.s. La dua okazo sekvis post tri tagoj, kaj denove la paciento estis ĵus veninta el Italujo.

De tiu momento la kvanto da okazoj sin sekvis laŭ la kutima supreniranta statistika kurbo. La Ministerio de Sano kunordigis ampleksan kampanjon por pretigo de fakaj hospitalaj sekcioj, alvokado de kuracistoj, ampleksigo de akcepto de pacientoj en la unu-nivela grado, disponigo de medicinaj konsultoj per interreto.

Je la 17-a de marto dokumentiĝis la unua morto pro kovim-19, en la urbo San-Paŭlo.

Dum aprilo kaj majo la malsano alarme eksplodis. En certaj regionoj,



mankis intens-flegaj fakoj en hospitaloj, kaj eĉ baza materialo komencis manki en iuj brazilaj ŝtatoj: maskoj, hospitalaj kiletoj, eĉ medikamentoj. Malgraŭ mendoj de spirig-aparatoj, multaj homoj mortis sen taŭga flegado. En tombejoj oni devis fari amasfosojn por komunaj sepultoj, ofte sen la ĉesto de parencoj. Friduoj staris apud iuj hospitaloj por konservado de kadavroj ĝis sepulto. Kuracistoj, flegistoj kaj san-teknikistoj devis labori sen taŭga sinprotekto, pro kio amaso da infektiĝoj kaj mortoj de medicinistoj estis anoncitaj.

En junio oni atingis la tragedian kvanton de pli ol po mil mortoj pro kovim-19 en ĉiu tago. Fine de junio jam unu miliono da infektitaj kaj ĉirkaŭ 50 mil mortintoj estis oficiale anoncitaj. Brazilo fariĝis unu el la “epicentroj” de la pandemio. Oni devas konsideri, krome, ke tiuj ciferoj eble ne montras la veran dimension de la pandemio en nia lando. La kvanto da disponigitaj diagnozaj testoj estis relative malalta en iuj regionoj, kaj multaj mortoj estis registritaj sub aliaj diagnozoj (“nesufiĉeco de pulma funkcio”, ekzemple), ĉar la pacientoj mortis antaŭ la konfirmo per kovim-19-testo. Kaj oni scias, ke multaj infektitaj ne prezentis simptomojn, do ili ne submetiĝis al testoj kaj eĉ ne scias, ke ili estis trafitaj de la viruso. Iuj esploristoj parolas pri milionoj da infektitaj en Brazilo.

La plej multenombre trafitaj brazilaj ŝtatoj estas San-Paŭlo, Rio-de-Ĵaneiro, Cearao kaj Parao.

Kial Brazilo fariĝis unu el la plej severe atingitaj landoj?

Ne estas facile respondi tion. La fenomeno kovim-19 estas komplika kaj nova. Oni povas tamen konjekti pri kelkaj kialoj, eĉ se ne kun plena certeco.

1. Brazilo estas neriĉa lando, kun san-sistemo nekontentiga, en multaj regionoj. Imagu ekzemple, kiaspecan flegadon povas ricevi indiano en la interno de la Amazonia arbaro, trafita de la viruso. En multaj el la kvin mil urboj ne ekzistas hospitaloj ekipitaj per intens-flegaj rimedoj. Okazis veraj hospitalaj kolapsoj, kaj pacientoj mortis ne atinginte hospitalan liton.

Paradokse, la ŝtato San-Paŭlo, la plej riĉa regiono en la lando kun la plej bone strukturita sanservo, fariĝis la plej atingita. Eble la datumoj estis pli precize kolektitaj kaj kalkulitaj en San-Paŭlo.

2. Ekzistas en Brazilo multaj malriĉaj kaj amase loĝataj kvartaloj en grandaj urboj (“favelas”), kie sanitaraj kaj higienaj rimedoj estas absolute mankantaj.

Ĝi estas demonstra versio de la 110-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Eventoj



La 20an de junio en la reto komenciĝis Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest' 2020), ĉe kies malfermo salutparolis Asista Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, Fabrizio Hochschild (Ĉilio), kiu ĝentile komencis kaj finis sian anglalingvan paroladon per frazoj en Esperanto.

MondaFest' 2020: UN salutis (parte) en Esperanto

Asista Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, Fabrizio Hochschild faris trimitan salutparoladon okaze de la Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest' 2020). Estas atentinde, ke ĉi tiu ĉilia diplomato komencis sian paroladon en Esperanto, sed daŭrigis en la angla kaj finis per "Dankon".

Lia parolado estas videoregistrata, ĝi estas aŭskultebla kaj spektebla ĉe Jutubo: <https://youtu.be/kFufDNdgrXo>

MondaFest' 2020: La unua semajno

La Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest' 2020) malfermiĝis la 20an de junio per la Somera Inaŭguro, spektebla ĉe UEA-viva: <https://youtu.be/SCMdxElu128>. Post la inaŭguro kadre de la unua festivala semajno pasis kelkaj okazaĵoj.

La unuaj kontribuoj venis de Kanado: la Virtuala Kinejo kun filmoj pri aktualaj temoj (21 jun, 24 jun) kaj la festivala lanĉo de la Poŝtkarto de Espero (22 jun).

Sekvis "En Kontakto!" (La unua sesio de pluraj babiladoj, realigataj de TEJO kaj la redaktoro de *Kontakto* Rogener Pavinski, 25 jun); Tago de Azio kaj Oceanio (26 jun); 65a AMO-seminario: "Landaj Asocioj – Leviĝantaj Agantoj" (27 jun); kaj Malfermo de NASK 2020 (29 jun).

GK UEA



Virtuala Kongreso de Esperanto: jam eblas aliĝi



**VIRTUALA KONGRESO
DE ESPERANTO**

Malfermiĝis la reta aliĝilo por la Virtuala Kongreso de Esperanto (VK), okazonta kadre de la Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest' 2020) inter la 1a kaj 8a de aŭgusto. Aliru ĝin per <http://vk.mondafest.net>.

La aliĝo al la VK estas senpaga por la Individuaj Membroj de UEA (kaj TEJO). Tamen tiel ke la Asocio povu provizi la plej bonajn rimedojn kaj servojn, necesas aliĝi ĝis la 26a de julio. Post tiu dato, estos antaŭvidata simbola kotizo por kovri la kostojn de la aldonaj laboroj pro malfruaj aliĝoj.

Se vi ankoraŭ ne membras en UEA por 2020, eblas aliĝi rekte tra la VK-aliĝilo: <https://vk.mondafest.net/uea-vk>. Aliĝi al la VK sen membriĝi en UEA eblas kontraŭ aliĝkotizo de 50 EUR ĝis la 26a de julio kaj 75 EUR post tiu dato. Subtenaj donacoj por realigo de la VK bonvenas.

GK UEA



Somera Esperanto-Studado 2020: virtuale kaj tutmonde

La pandemiaj obstakloj ne permesas, ke SES 2020 okazu fizike en Ĉeĥio, kiel planite. Sed ĝi tamen ja okazos – virtuale kaj tutmonde! Ĝi okazos la 18-26an de julio, kaj la ĉefa instruado okazos dum la du semajnfinoj (kun aldona libervola programo inter ili, ĉefe posttagmeze/vespere laŭ la mezeŭropa tempozone).

Dum SES okazos ne nur diversnivelaj kursoj de Esperanto, sed ankaŭ kurso pri Esperanto-literaturo kaj kulturo kaj kurso pri tradukado de kaj al Esperanto. La kursojn gvidos spertaj instruistoj. Krome la partoprenantojn atendas prelegoj, diskutoj, kvizoj, koncertoj kaj multe pli, vidu ĉe <https://ses.ikso.net/2020/eo/instruado>.

Pere de la “virtuala SES” nian Esperanto-lernejon povos partopreni pli da homoj ol kutime, de ie ajn en la mondo. Ili povos havi sperton de internacia aranĝo kaj samtempe resti hejme. Aldone oni ŝparas kaj monon (la kosto de la reta SES estas signife malpli alta) kaj tempon (ne necesas vojaĝi al la SES-ejo kaj reen). Tiel la aranĝo estas ankaŭ pli ekologia!

Ĝi estas demonstra versio de la 110-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



POLYGLOT GATHERING



ONLINE

Poliglotoj kunvenis virtuale kaj rekorde

Ĉu vi interesiĝas pri lingvoj? Por poliglotoj kaj lingvoŝatantoj de la tuta mondo ĉiujare fine de majo okazas speciala evento – Poliglota Kunveno (Polyglot Gathering). Dum ĝi kutime okazas multaj prelegoj pri lingvaj temoj, koncertoj, sociaj programeroj, kaj kompreneble estas eblo praktiki plurajn lingvojn.

Post la ĉefurboj de Germanio kaj Slovakio, ĉi-jare ĝi devis okazi la unuan fojon en Pollando en la urbo Teresin, sed pro la pandemiaj obstakloj ĝi okazis rete – unuafoje en ĝia historio. Pli ol 1120 homoj de la tuta mondo partoprenis la Poliglotan Kunvenon Enrete 2020 (Polyglot Gathering Online 2020 www.polyglotgathering.com) – la plej grandan poliglotan eventon, iam ajn organizitan – kaj organizitan de esperantistoj de E@!!

Kvankam la teamo de E@I neniam antaŭe organizis grandan retan eventon, la teamanoj sukcesis tre rapide adapti la programon por la virtuala aranĝo kaj krei specialan retan platformon por ĝi. Certe helpis al ili scioj de la multjara organiza sperto en Esperanto-movado kaj tri sukcese organizitaj Poliglota Kunvenoj en Bratislavo. Dum la virtuala evento la celo estis ne nur organizi prelegojn kaj koncertojn, sed ankaŭ transdoni la etoson de la aranĝo – por ke partoprenantoj sentu, ke ili estas parto de la poliglota komunumo.

La reta Poliglota Kunveno 2020 daŭris kvar tagojn kaj enhavis 43 prilingvajn prelegojn, pli ol 350 lingvo-praktikĉambrojn, sep lingvajn rapidkursojn, kvar intervjuojn kaj panelajn diskutojn, tri kvizojn, talentspektaklon kaj plurlingvan koncerton de jOmO.

Laŭ la partoprenintoj, la evento estis tre sukcesa! Ili ĝojis, ke malgraŭ la pandemio ili povis ekscii ion novan dum la prelegoj, amuziĝi dum la sociaj programeroj kaj praktiki lingvojn kun aliaj partoprenantoj. La eventon partoprenis preskaŭ duoble pli multe da homoj ol la pasintjara aranĝon en Bratislavo! Certe pluraj ne havas eblon partopreni la surlokan aranĝon – ĉu pro manko de tempo aŭ mono, ĉu pro tro longa distanco, ĉu pro aliaj kialoj. La virtualigo permesis al ili resti hejme, kio multe plifaciligis ilian partoprenon.

Ankaŭ Esperanto-komunumo multe helpis al la aranĝo. Krom tio, ke UEA denove estos sponsoro ankaŭ por la venontjara Poliglota Kunveno en Teresin, okazis tre interesaj priesperantaj programeroj: prelego de Rakoen Maertens “Esperanto kaj UN: defioj pri lingvoj kaj kulturoj de la mondo”, rapidkurso de Esperanto de Tim Morley, prelego “Reformita Esperanto” de Pjotr Fedosov kaj diskuto pri lingvopolitiko. La kunvenon partoprenis pluraj esperantistoj, kaj la Esperanta praktikĉambro ĉiam estis plena. Dum la kunveno naskiĝis Telegram-grupo por la partoprenantoj de la Poliglota Kunveno, kiuj ekinteresiĝis aŭ jam lernas Esperanton kaj volas praktiki ĝin.

La sukceso de la Poliglota Kunveno pensigis E@I pri organizado de virtuala aranĝo ankaŭ estonte. Ĝi ne anstataŭigos la fizikan eventon, sed ĝi estas tre bona aldonaĵo, pere de kiu partoprenas pluraj homoj, kiuj ne povas ĉeesti la “vivan” eventon. Do eble venontjare estos du aranĝoj – la fizika en Teresin la 19-23an de majo 2021 kaj iam dum la sama jaro ankaŭ la virtuala Poliglota Kunveno. Ĉu tio sonas interese por vi? Sekvu nin en sociaj retoj por ekscii novaĵojn! <https://www.facebook.com/polyglotgathering/>

Sonja Zaretskaia

PGO-kunorganizanto, E@I-teamano

Giorgio Silfer invitita por prezidi en Hungario

“Konsentite kun la respondeculoj de prezidantaro de la Hungaria Esperanto-Asocio (HEA), ni ŝatus kontaktiĝi kun Vi <...> por ke ni povu kandidatiĝi Vin kiel prezidanton de HEA. Post kiam Vi akceptos la kandidatiĝon, ĝi estos proponita al la Asembleo de HEA. Ni petas Vin, bonvolu akcepti: <...> ni ŝatus, ke HEA estu prezidata de digna homo, nome Vi, kiu havas vastajn, internaciajn ligojn, kiel karisma, sperta gvidanto de la Esperanto-movado”.

Ĝi estas demonstra versio de la 110-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



“Tetrinkado” (Bildo de Vasilij Nesterenko)

TEO: nova kunlaboranta faka asocio de UEA

La Komitato de UEA rete aprobis kunlaboran kontrakton inter Teamanta Esperantista Organizo (TEO) kaj Universala Esperanto-Asocio (UEA). En la voĉdonado 47 komitatanoj sin esprimis, el kiuj 43 aprobis la kunlaboran kontrakton.

La aprobo sekvis dektagan diskutadon, surbaze de ampleksa raporto preparita de la Estraro, kiu krom statuton kaj priskribon de la agado de TEO prezentis ankaŭ nove verkitan kontrakton, kiu povos servi kiel ŝablono por kontraktoj de aliaj Fakaj Asocioj, novaj kaj ekzistantaj.

La propono kontrakte kunlabori kun TEO estis farita al la Komitato okaze de la Monda Tago de TEO, la 21an majo 2020. Tiukaze TEO kaj UEA komune mesaĝis. La Tago estis deklarita de UN pro la graveco de teo por granda parto de la homaro, de la profesia, industria, ekologia kaj kultura vidpunkto: en pli ol 120 landoj teo forte ligiĝas al la kampo de homaj rilatoj, internacia kunlaboro kaj daŭripova evoluigo, kongrue al la Tagordo 2030 de Unuiĝintaj Nacioj.

TEO estis oficiale fondita en 2019, dum la 104a Universala Kongreso en Lahtio, sed ĝi baziĝis sur laborgrupo, kiu organizis filmkonkurson “Teo kaj Amo” kaj aliajn aktivaĵojn, pri kiuj eblas legi en la supre menciita raporto. TEO estas la 30a kunlaboranta faka asocio de UEA.

GK UEA

Skoltismo: Senpaga aliĝebleco al SEL

Skolta Esperanto-Ligo (SEL), internacia faka asocio, fondita en 1918 kaj kunlaboranta kun UEA, decidis fari senpaga la jaran membrecon. La estraro konsideras, ke la Ligo kalkulas je multaj volontuloj kaj la nuntempe disponeblaj rimedoj povas kovri la kostojn de la baza agado. La membroj povos pagi por aldonaj servoj, je la kosto. Por difinitaj agadoj kaj konkreta bezono oni starigos kampanjon por kolektado de laŭcelaj rimedoj.

Sen la postulo de membro-kotizoj – kaj sen la komplikaĵoj kaj kromkostoj sendi monon ofte alikontinenten – pli da geskoltoj kaj geskoltestroj, aktivaj kaj iamaj, povos resti informitaj kaj kunligitaj ĉirkaŭ SEL.

“Iam skolto, ĉiam skolto”, – oni diras. Do eĉ esperantistoj, kiuj ne plu agadas en skoltismo aŭ kiuj simpatias kaj apogas tiun movadon, povas montri sian subtenon al la du ideoj per enregistriĝo en SEL. Sufiĉas aliri ĝian retejon www.skolta.org kaj plenigi la formularon.

Pri skoltismo kaj Esperanto. En 1908 skoltismo estis porjunulara movado iniciatita de brita generalo Baden-Powell (1857-1941). La ideo tuj kaptis la publikon per serio de ses broŝuroj amase disvenditaj kaj aperintaj ĉiun duan semajnon. En unu el ili, la aŭtoro rekomendis al la skoltoj lerni Esperanton ne nur kiel “sekretan lingvon” por skolta patrolo sed ankaŭ ĉar “oni povas elturniĝi per ĝi en aliaj landoj” kaj “ĝiaj lernolibretoj estas nekostaj”.

Dek jarojn poste, en 1918, Skolta Esperanto-Ligo estis fondita de Alexander William Thomson (ps. Avoto), kiu pensis dum la milito pri starigo de organizaĵo por favori la internacian amikecon kaj reciprokajn servo-interŝanĝojn inter geskoltoj, kun Esperanto kiel lingvo.

Skoltismo estas praktikata de knaboj kaj knabinoj en preskaŭ ĉiu lando de la mondo kaj la lingvaj demandoj (kaj limigoj) estas spertataj ankaŭ en internaciaj skoltaj organizaĵoj.

SEL

UN lanĉis enketon. Ankaŭ en Esperanto

Unuiĝintaj Nacioj (UN) festas sian 75-jariĝon en periodo de grandaj defioj, inkluzive de la plej akra tutmonda sano-krizo en sia historio. Ĉu ĝi alproksimigos la mondon? Aŭ ĉu ĝi kondukos al pli grandaj dividiĝoj kaj malfido? Viaj opinioj povas fari diferencon. UN proponas plenigi enketilon en pluraj lingvoj, ankaŭ en Esperanto. Viaj respondoj al ĉi tiu enketilo influos tutmondajn prioritatojn nun kaj estontece.

La enketilo estas ĉe <https://un75.online/?lang=epo>

Iĝu amiko de “La Ondo de Esperanto”!

Ni funebras kaj kondolencas

La 22an de aprilo 2020 en hospitalo de Vuhano forpasis

Hu Guozhu (1938-2020)

ĉina teksum-industria inĝeniero kaj esperantisto (1956); vicprezidanto (1986-2000) kaj prezidanto (2001-10) de Hubeja Esperanto-Asocio, kunlaboranto de *El Popola Ĉinio*, *La Gazeto* kaj *La Kancerkliniko*; aŭtoro kaj tradukinto de pluraj beletraj libroj (i.a. de Du Fu, Li Bai, Lusin, Bai Juyi kaj *Strangaĵoj de Liaozhai* de Pu Songling), kiuj aperis papere kaj/aŭ elektronike en lia retejo, honora membro de ILEI (2017).

La 27an de aprilo 2020 en Bilbao en sia 108-jara aĝo mortis

Eduardo Larrouy (1913-2020)

hispana negocisto kaj esperantisto (ekde 1932), Esperanto-instruisto kaj jama prezidanto de la Esperanto-grupo de Bilbao, unu el la homoj plej maljunaj en Hispanujo kaj eble al la plej maljuna en Esperantujo.

La 21an de majo 2020 pro la koronaviruso COVID-19 mortis

Hilary "Bill" Chapman (1950-2020)

brita instruisto, socia aganto, urbestro de Conwy (Kimrio) kaj esperantisto (ekde 1967), konata en Esperantujo kiel Bill Chapman; ĉefdelegito de UEA por Britio, esploranto de la historio de Esperanto, aŭtoro de pluraj tiutemaj artikoloj kaj de la libro *The Early History of Esperanto in the United Kingdom* (2019).

La 24an de majo 2020 en sia 83a vivojaro forpasis

Victor Sadler (1937-2020)

brita filologo, programisto kaj esperantisto (ekde 1951). Post sia doktoriĝo pri fonetiko (1962) li dum dudeko da jaroj laboris en la Centra Oficejo (CO) de UEA en Roterdamo kiel redaktoro de *Esperanto* (1962-74), redaktoro de *La Monda Lingvo-Problemo* (nun *Language Problems and Language Planning*, 1969-72), direktoro de CO de UEA (1968-80), ĝenerala direktoro de UEA (1980-83). En CO de UEA li prizorgis la eldonadon kaj la bibliotekon Hodler, plenumis la taskojn de KKS (1974-76), kaj estis administranto de Institucio Hodler '68 (1979-83).

Post CO Sadler pasigis du jarojn en Brazilo kaj de 1985 ĝis sia emeritiĝo laboris en Utreĥto (Nederlando) kiel programisto ĉe la kompanio BSO; dum la kvin unuaj jaroj li okupiĝis pri la projekto Distribuita Lingva Tradukado, en kiu Esperanto ludis kernan rolon.

Sadler estis estrarano de UEA (1986-87) kaj membro de la Akademio de Esperanto (1970-83). Li verkis kelkajn broŝurojn pri Esperanto, terminaron pri budhismo (1962), Esperanto-sinhalan vortaron (1963), fakajn studojn pri DLT. Sadler estas aŭtoro de la poemaroj *Memkritiko* (1967) kaj *Perversaj rilatoj* (2015). Dum la lastaj 30 jaroj li plu aktivis movade.

La 11an de junio 2020 forpasis

Rimantas Stanislovas Endriulaitis (1938-2020)

sovetunia kaj litovia inĝeniero kaj esperantisto (ekde 1967), Esperanto-aktivulo en Vilno kaj Jurbarkas, verŝajne, la plej aktiva produktanto de Esperanto-insignoj en la mondo kun entute pli ol 350 projektitaj kaj fabrikitaj insignoj.

Ni funebras kaj kondolencas.

Halina Gorecka, Aleksander Korjenkov

Tribuno



Dum en la kondiĉoj de la koronavirusa pandemio preskaŭ ĉiuj esperantistaj asocioj malvigligiĝis (“preskaŭ”, ĉar eble via klubo aŭ via landa asocio aktivus per kaj por Esperanto), la internacia junulara organizo E@I (Edukado@Interreto) daŭrigas sian intensan kaj varian agadon, preparante novajn programojn kaj realigante aliajn retprojektojn. Gratulon kaj dankon ni sendas al Peter Baláž kaj al lia diligenta kolegaro!

Pliefikigu vian tempouzadon – plene en Esperanto

“Se vi ne povas mezuri ĝin, vi probable ne povas mastrumi ĝin. Aferoj, kiujn vi mezuras tendencas pliboniĝi”, – diris Ed Seykota. En la Esperanta movado la tempo estas nia tre valora kaj rara resurso – ni havas nur tiom da ĝi. Sed kiel ni utiligas ĝin? Ĉu vere verko de tiu artikolo devis daŭri du tagojn? Aŭ kiom ĝi fakte daŭris? Se vi ne mezuras vian tempouzadon, vi ne povas vere scii. Feliĉe, tempomezurado nun estas facila – kaj plene en Esperanto – danke al Kimai kaj E@I!

En Esperantujo ni kutimas al virtuala laboro per interreto de sia hejmo. Tiel estis ankaŭ en E@I dum komenca tempo. Sed jam dum jaroj ni laboras (ankaŭ) en fizika oficejo laŭ fiksitaj laborhoroj. Tiu stato ŝanceliĝis pro la kronviroza situacio, kaj ni devis rapide adaptiĝi. Ja kiam oni laboras en la hejmo, estas facile nesufiĉe labori aŭ nesufiĉe ripozi, eble neefike plani la labortempon. Utiliginte spertojn de TEJO, ni decidis ekuzi liberan temporegistran programon Kimai. Ĝi solvas ĝuste tiajn problemojn, montrante viajn taskojn kaj statistikon pri via labortempo.

Kimai estas senpaga libera ilo, kiu ebligas al vi registri viajn laborhorojn. Kun ĝi por vi pli klaras, kiom da tempo vi bezonas por fari viajn taskojn. Nun la programo estas en 22 lingvoj, kaj dank’ al E@I inter ili estas ankaŭ Esperanto. La programon tradukis Sonja Zaretskaia kaj kontrolis KuboF Hromoslav. Kaj ĉar Kimai mem dependas de pluraj aliaj programoj, por plena Esperantigo ni tradukis ankaŭ *Select2* (jam akceptita) kaj *FullCalendar* (dume atendas).

Intervjuo kun la ĉefprogramisto

Okaze de la oficialigo de Esperanto en Kimai, ni intervjuis ĝian ĉefprogramiston Kevin Papst. Kevin antaŭe havis malmultajn informojn pri Esperanto, sed li tre aprezis tradukon al ĝi. Ja, laŭ li, Esperanto estas speciala, ĉar homoj mem elektas eklerni kaj paroli ĝin. Tio igas Esperantan tradukon ankaŭ unika vendo-propono.

Kio inspiris vin komenci kaj daŭre labori pri la projekto?

Kiam mi eklaboris pri Kimai antaŭ pli ol dek jaroj, mi havis bezonon pri temporegistra sistemo por mi mem. En la tempo kiam mi trovis Kimaion, la origina programisto volis fermi la projekton pro privataj kialoj. Mi ensaltis kaj prenis la rolon de prizorganto kaj daŭrigas la laboron ĝis hodiaŭ. Malfermit-fonta programaro igas komputikan mondon pli bona loko, kaj mi volas kontribui al ĝi en sencohava maniero.

Mi havas ankaŭ alian fortan motivaĵon: Mi ĉiam revis pri eblo vivi de mia propra malfermit-fonta programaro. Tial mi en 2018 komencis reprogrami Kimaion ekde nulo kun multaj novaj funkcioj kaj firma fundamento por kelkaj longtempaj celoj (unu el ili ĵus realiĝis: www.kimai.cloud).

Kiel Kimai povas utili al neprofitcelaj organizoj?

Mia respondo estas pli ĝenerala, por ĉiu kiu uzas temporegistradon memvole: komencu registri vian tempon por trovi pro kiu kaj, speciale, kie vi pasigas unu el viaj plej valoraj resursoj – vian vivtempon. Kiuj taskoj reaperas, kiuj problemaj punktoj

povas esti identigitaj, kiu en la teamo povas bezoni asiston pro troa laborŝarĝo? Provu identigi malfortajn punktojn kaj pensu pri strategioj kiel plisimpligi aŭ eĉ elimini tiujn taskojn.

Tre simpla ekzemplo: Pasintece mi pasigis kelkajn horojn ĉiusemajne pro retpoŝta helpado pri Kimai. Mi ne povis respondi al ĉiu, sed danke al verkado de pli bona dokumentado mi povis ne nur fortaĉi 75% de mia tempo bezonata por retpoŝta helpado (kion mi povis pruvi komparante miajn temposlipojn en Kimai) sed mi ankaŭ ricevis multajn pozitivajn reagojn. Feliĉaj uzantoj – feliĉa mi.

Ĉu vi havas iun mesaĝon por Esperantujo?

Por multaj organizoj, precipe neprofitcelaj, mono estas forta kialo por atenti pri libera programaro. Kimai tion povas fari por vi: elŝutu, instalu, komencu registri vian tempon – ĉio sen licencaj kotizoj. Mi volas inviti ĉiujn al provo de Kimai. Ankoraŭ estas multaj aferoj por plibonigo en Kimai, sed ja bonas samdirektigi miajn ideojn kun realaj bezonoj de uzantoj.

“Havu feliĉan vivon kaj restu sana!” (Kevin skribis rekte en Esperanto.)

La strukturo de Kimai estas fasonita por homoj kaj firmaoj, kiuj laboras laŭ kontraktoj por pluraj klientoj. Kvankam tio ne estas kutima situacio de Esperantaj organizoj, Kimai estas sufiĉe fleksebla por servi vin bone, kiel montras ankaŭ niaj spertoj. (Ekzemple sufiĉas starigi ununuran “klienton” – sian propran organizon.) Ĉiun unuopan registraĵon vi povas detale priskribi por povi poste bone pritaksi efikecon de via tempouzado aŭ por aŭtomate prepari fakturon por pagi vin. Aŭ vi povas uzi minimumisman sintenon. Tute laŭ via plaĉo. Baze eblas tian ĉi temporegistrilon uzadi laŭ du manieroj.

Registrado de ĝenerala labortempo: Tiu maniero taŭgas por scii, ĉu en specifa tago / semajno / monato vi laboris ĝustan tempon. Vi komence de la laboro notas la komencon kaj fine de la laboro la finon, sed vi ne distingas inter aktivajoj. Tiel vi scias, kiam vi laboris ĝustan tempon kaj povas poste altkvalite ripozi por rehavigi energion.

Registrado de speco de labortempo: Vi notas la komencon kaj la finon de ĉiu specifa aktivado. Tiel vi ne nur scios, kiom vi laboris, sed ankaŭ, pri kiu tasko. Tio donos al vi reagon, laŭ kiu vi pli objektive taksos vian rapidecon kaj pli facile kaj objektive vi decidus, pri kio vi povas pliboniĝi kaj pri kio vi eventuale povas instrui al aliuloj.

Ĝi estas demonstra versio de la 110-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Leterkesto

Koran dankon pro la printempa “Ondo”. Mi admiras viajn agadon kaj talenton. Ĝis kiam ekzistas esperantistoj kiel vi, Esperanto ne pereos. La printempa “Ondo” estas valora kaj riĉenhava. Eĉ en la naciaj lingvoj tiaj revuoj estas maloftaj.

Mi ankoraŭfoje kore dankas al vi

Georgi Mihalkov
(Bulgario)

Bonorde kaj akurate mi ricevis la unuan numeron de la almanako. Laŭ mia vidpunkto temas pri kultura revuo pli ol kutime, kvankam post kiam LODE iĝis bitgazeto, ĝi iĝis ankaŭ iom pli kultura ol antaŭe. Do, pliprofundiĝas la vektoro kultura, kaj tio pliinteresas min.

Eble oni lasu la Esperanto-renkontiĝojn al Esperanto-revuo, kvankam tio signifas ŝanĝon eble nedezireblan viaflanke... Restas diri tion, ke la revuo daŭre interesas min, kaj ĉiu numero havas plurajn interesajn motivojn. Mi abonas «tro» da revuoj kun multe da legaĵoj, kaj mi bedaŭras kelkfoje elekti iun legaĵon unu anstataŭ alian, sed pli bonas elekti ol male.

Mi aldonas nur, ke mi ŝatus legi pli da intervjuoj kun aŭtoroj: verkistoj, pentristoj, muzikistoj kaj aliaj.

Luis Ladeira
(Portugaliao)

De kelkaj jaroj mi abonas kaj legas “La Ondo de Esperanto”. La revuo ĉiam plaĉis al mi, ankaŭ pri la nova “Ondo” numero 303 mi estas kontenta. Do mi pagis la abonon.

Stanisław Polanowski
(Pollando)

Mi jam elŝutis ĝin kaj komencis legi. Mi estas impresita! Pli ol 100 paĝoj da riĉa, varia, altnivela materialo! Mi admiras vian kapablon! Estas por mi honoro, ke mia teksto aperas en ĝi!

Paulo Sérgio Viana
(Brazilo)

Ĝi estas demonstra versio de la 110-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Arkivo



Antaŭ 110 jaroj en Vaŝingtono okazis la unua ekstereŭropa mondkongreso esperantista. Tiutempaj transoceanaj vojaĝoj estis longaj, kaj pasaĝeroj havis sufiĉe da tempo por babili. La unua Esperanta poetino Marie Hankel revenis el Usono en Eŭropon en la sama ŝipego kun Zamenhof, kaj post la reveno ŝi verkis prian artikolon *La hejmveturado*, kiun ni proponas al vi en nia “Arkivo”. (Sur la bildo estas la ŝipo “Kaiserin Auguste Victoria”).

Jubileoj kaj memordatoj en julio 2020

1. Antaŭ 15 jaroj mortis **Fernando de Diego de la Rosa** (1919-1933-2005), hispana tradukisto, redaktoro kaj esperantisto, loĝinta en Venezuelo kaj Pollando; unu el la plej elstaraj Esperanto-tradukistoj (*Cigana romancaro* de F. García Lorca, 1971; *La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha* de M. Cervantes, 1977; *Boule de suif* de G. Maupassant, 1982; *D-ro Jekyll kaj S-ro Hyde* de R. Stevenson, 1985; *La familio de Pascual Duarte* de C. J. Cela, 1985; *Sentempa simfonio: Poem-antologio hispana*, 1987; *Norda odiseado kaj aliaj rakontoj* de J. London, 1988; *Drolaj rakontoj* de H. Balzac, 1989; *Cent jaroj da soleco* de G. García Márquez, 1992; *La oldulo kaj la maro* de E. Hemingway, 1996 k. m. a.); aŭtoro de *Pri Esperanta tradukarto* (1979), *Nuevo método de Esperanto para clases y autodidactas* (1982), *Pri literatura kritiko* (1984), *Gran Diccionario Español-Esperanto* (2003). Kunaŭtoro de *Literatura Manifesto '87*, laŭreato de la OSIEK-premio (1997, pro la traduko de *Cent jaroj da soleco*), honora membro de UEA (1993). — Legu pli en NDK, p. 70-72.

3. Antaŭ 100 jaroj naskiĝis **Nicolina Gabrielli** (1920-1955-2016), itala ĵurnalistino, verkistino, eldonistino kaj esperantistino konata en Esperanto kiel Lina Gabrielli kaj Lina Trenner Gabrielli; aŭtorino de sep beletraj libroj en Esperanto: *La kombilo* (1962), *Bill kaj Lazuraj Okuloj: aŭ du kuleretoj da ĉielo* (Kun A. Goldoni, 1964), *Karnavalo* (1973), *Ni devas vivi* (Kun K. Walraamoen, 1974), *La ĝardeno de la urbestro* (1978), *Vivendo* (1979), *Nuancoj* (Kun K. Szczurek, 1980) kaj de kvin tradukoj. Ŝi eldonis, plejparte kun la eldonmarko *Plejado*, kvardekon da libroj, inter kiuj, krom ŝiaj propraj verkoj, estis la kvarvoluma preskaŭ milpaĝa antologio *Tra la parko de la franca poezio*, kiun kompilis, tradukis kaj komentis G. Waringhien; honora membro de UEA (2001). — Legu pli en NDK, p. 99-100.

3. Antaŭ 10 jaroj mortis **Umesao Tadao** (1920-1945?-2010), japana kultura antropologo, iniciatinto kaj direktoro de la Japana Nacia Muzeo de Etnologio, kaj esperantisto, Esperanto-instruisto, aŭtoro de *La spirito de Esperanto* (1983), *Sepdek sep ŝlosiloj por la japana civilizacio* (1987) kaj de la japanlingva esearo *Miaj travivaĵoj en Esperantujo* (1994), kuntradukinto de *Vivo de Zamenhof* de E. Privat en la japanan (1965); membro de la Honora Patrona Komitato de UEA.

11. Antaŭ 75 jaroj naskiĝis **Vilmos Benczik** (1945-1959-), hungara instruisto, literaturisto, tradukisto, eldonisto kaj esperantisto; redaktoro de *Hungara Vivo* (1976-90), direktoro de la libroeldonejo de HEA en kiu sub lia direktado aperis 138 Esperanto-libroj; kompilinto kaj redaktinto de pluraj kolektivaj verkoj, i.a.: *25 jaroj: Antologio de belartaj konkursoj* (kun W. Auld, 1977), *Baza Literatura Krestomatio* (1979), *Hungara antologio* (1983), *Baza legolibro por komencantoj* (1986),

Lingva arto. Jubilea libro omaĝe al William Auld kaj Marjorie Boulton (1999), aŭtoro de pluraj artikoloj, recenzoj, antaŭ- kaj postparoloj (kelkaj el ili aperis en lia esearo *Studoj pri la Esperanta literaturo*, 1980), tradukanto; prezidanto de HEA (1990-92), komitatano de UEA (1980-86), prezidanto de la juĝkomisiono de Belartaj Konkursoj de UEA (1986-2002), membro de la Akademio de Esperanto (2001-); honora membro de UEA (2016). — Legu pli en NDK, p. 32-34.

14. Antaŭ 70 jaroj naskiĝis **Gianfranco Molle** (1950-1975-2018), itala muzik-instruisto, kanzonisto kaj esperantisto, kies kantoj, gitare akompanitaj de li mem, estas registritaj en ses liaj albumoj: *La vojo* (1976), *Horo da opozicio* (1978), *Kontakto* (1979), *La Poezio de la Patrolo* (1980), *Baf!* (1985), *La Fiŝkaptisto* (2007), en kelkaj kolektoj kaj en *Esperanta Songazeto*.

15. Antaŭ 65 jaroj naskiĝis **Jouko Lindstedt** (1955-1969-), finna lingvisto kaj esperantisto; aŭtoro de pluraj artikoloj kaj recenzoj aperintaj en libroj kaj gazetoj, kunaŭtoro kaj redaktoro de la *Hejma vortaro* (1999), redaktoro de *Planlingvistiko* (1981-83); prezidanto de la estraro de la Fondumo Esperanto (2001-), membro de la Akademio de Esperanto (1998-); kunverkinto de la Manifesto de Raŭmo (1980); laŭreato de la titolo “La Esperantisto de la Jaro 2000” (kun H. Bakker kaj M. La Torre); patro de tri denaskaj esperantistoj. — Legu pli en NDK, p. 179-180.

16. Antaŭ 160 jaroj naskiĝis **Félicien Menu de Ménil** (1860-1901-1930), franca diplomato, komponisto kaj esperantisto; aktiva propagandisto de Esperanto kaj aŭtoro de pluraj artikoloj, redaktoro de *La Revuo* (1906-14) kaj *Franca Esperantisto* (1908-12), aŭtoro de *Les préjugés contre l'Espéranto* (1908) kaj *Muzika Terminaro* (1908), komponinto de muziko por pluraj Esperanto-kantoj, i.a., por la Zamenhofa poemo *La Espero*, kiu iĝis la himno de Esperanto; membro de la Lingva Komitato (1914-30).

21. Antaŭ 40 jaroj mortis **Aleksandr Logvin** (Александр Порфирьевич Логвин, 1903-1923-1980), sovetunia fervojisto, ĵurnalisto kaj esperantisto, konata en Esperanto kiel Aleksandro Liljer; aŭtoro de la poemaro *Sur la vivovojo* (1964) kaj de la posteume eldonita *La lasta taglibro de l' poeto* (2003).

27. Antaŭ 75 jaroj naskiĝis **Tazio Carlevaro** (1945-), svisa kuracisto, psikiatro, psikoterapiisto, interlingvisto, idisto, esperantisto kaj konanto de pliaj planlingvoj; prezidanto de la kooperativo de Literatura Foiro (1980-85), kunaŭtoro de *Esperanto en perspektivo* (1974), aŭtoro de *Eseo pri Ido* (1976), *Esperanto aŭ Interlingua?..* (1977), *Sociopsikologio kaj grupodinamiko de la Esperanto-movado* (1977), *Che cos'è l'Esperanto* (1985), *Per costruire una lingua. Manuale d'interlinguistica* (1993), *Bibliografio di Ido* (kun R. Hauptenthal, 1999) *Cxu Esperanto postvivos la jaron 2045?* (1999) k. a.; honora membro de SES (2019).

Aleksander Korĵenkov

La hejmveturado.

Originale verkis Marie Hankel



La sesa internacia Esperantista kongreso¹ en Waŝingtono finiĝis. Ĉio estis bela kaj kontentiga. Tre agrablan semajnon mi post la kongreso travivis ĉe gesamideanaj amikoj en Boston, sed la plej bela ankoraŭ sekvis, la hejmenoŭjaĝo kune kun la Majstro kaj lia edzino. Ni estis ses Esperantistoj sur la granda bela ŝipo Kaiserin Auguste Victoria². Ho, kia feliĉa sento, kiam denove muziko salutis la unuan pasaĝeron, enirantan la ŝipon! Nun ni denove estis en nia senzorgejo, dum dek tagoj ni spiros la puran aeron de la maro, ni aŭdos ĝian dolĉan bruadon kaj muĝadon. Strange estas, ke sur ŝipo oni neniam pensas pri danĝero, oni sentas bonan, grandan ŝipon sub la piedoj, oni havas konfidon kaj estas trankvila. La vetero estis bona, tiel trankvila estis la maro, ke ankaŭ nia Majstro, kiu inklinas al marmalsano, ĉiam bone fartis. Por li la ŝipo estas tre taŭga loko. Tie li estas devigata ripozi de sia troa laboro. Li ja estas okulkuracisto kaj laboras la tutan tagon, de la mateno ĝis la vespero. Kaj vespere kompreneble li laboras por Esperanto. Por vivigi siajn fortojn li intertempe ĉiam fumas cigaredojn. Krom tio li estas kormalsana kaj faras delikatan impreson. La tuta esperantistaro ja deziras, ke li ne tiel multe laboru, sed tio restos verŝajne vana deziro. Ŝajnas al mi, ke li neniam akceptos monon por si mem. Li estas tro aristokrata por tio, eble li ankaŭ deziras resti tute libera. Estas ja fakto, ke oni perdas la liberecon, akceptante monon.

Sed nun sur la ŝipo laboro ne ekzistis. Ni ĝuis la agrablan, iom tro luksan vivadon de la unua klaso. Ni promenis, manĝis, aŭdis muzikon kaj rigardis la maron. Legante ni ankaŭ sidis en niaj kuŝoseĝoj. Ili sin trovis sur la "Sonnendeck" (sunoferdeko), tiun nomon havis la sesa etaĝo de la ŝipo. Niaj kajutoj sin trovis en pli malaltaj etaĝoj aŭ ferdekoj. Per lifto ni multfoje ĉiutage supren kaj malsupren iris. Niaj ses seĝoj staris en vico, unu apud la alia. Tie ni sidis multajn horojn kun niaj libroj. Kelfoje mi sidis apud la Majstro. Li afable diris al mi: "Mi ne estas parolema homo, pardonu, ke mi estas silenta. Sed, se vi deziras paroli aŭ ion demandi, mi estos ĉiam preta respondi. Mia legado ne estas grava, mi ĝin volonte interrompos." Kompreneble mi ne trouzis ĉi tiun amindan permeson, tamen mi aŭdis multajn interesajn eldirojn el la buŝo de la Majstro. Ĉiu vorto estis tiel mirinde klara kaj saĝa, ke

mi nur povas konsili: “Se vi estas duba aŭ necerta pri iu ajn esprimo en nia lingvo, demandu la Majstron, lia respondo certe vin kontentigos.”

Jen malgranda ekzemplo: Ekzistas unuiĝo por la enkonduko de la tiel nomata “Monosystem”, certa, egala formato de presaĵoj. Ni esprimis la bedaŭron, ke la vorto monosistemo havas alian sencon en Esperanto. “Oni ja povas diri monoa sistemo,” diris la Majstro. Jes, tiel oni certe povas diri!

Vi ja scias, ke nia Majstro neniam proponos ŝanĝojn en nia lingvo³. Tamen li diris: “Mi ne povas antaŭvidi la estontecon, mi ne volas min kateni. Certe mi nenion ŝanĝos sen la Akademio, la Lingva Komitato kaj la Esperantistaro.” Estas rimarkinde, ke la Majstro ĉiam citas la Esperantistaron kiel samrajtan juĝanton de lingvaj aferoj.

Ĉiuj proponoj pri ŝanĝoj lasas lin tre trankvila. Li aŭdas ilin sen ia emocio. “Tion mi konas de 23 jaroj,” li diris. “Mi ricevis sennombrajn leterojn kun la certigo, ke la skribinto plene aprobas la fundamenton, ke li neniam kaj neniel konsentus je iu ajn ŝanĝo. Sed tre ofte la skribinto en la sama letero tamen proponas unu malgrandan ŝanĝon, kiu laŭ lia opinio estas dezirinde. Komprenoble ĉiu havas alian deziron, ĉiu havas sian propran guston kaj opinion. Sekvinte la konsilojn, mi devus ŝanĝi la tutan lingvon.”

Pri la Idistoj la Majstro estas trankvila. Ili ne daŭre nin malhelpos, ĉar ili ne estas unuanimaj. Ankaŭ ili havas inter si diversajn opiniojn, same kiel ni. Ĉar ili ne havas la volon rezigni iun ajn opinion, ili certe disiĝos iatemp. D-ro Zamenhof tre deziras, ke oni pli uzu, aĉetu kaj konu la fundamenton. Li deziras, ke ĉiu Esperantisto posedu ĉi tiun libron. Multaj ĝin eĉ ne konas, personoj, kiuj tre decide parolas pri la fundamento ne posedas ĉi tiun gravan libron.

Laŭ la deziro kaj la opinio de la Majstro ĉiu lernolibro havu sur la unuaj paĝoj la 16 regulojn de la fundamento, la cetero nur estu komentario de tiuj ĉi reguloj. Nur la 16 reguloj estu la oficiala parto, la komentario estu privata laboro. Li malaprobas dikajn lernolibrojn por komencantoj, ili fortimigas la homojn. Nia lingvo ĉiam devas esti simpla kaj facila. Ekzistas nun la inklino, malfaciligi ĝin. Ni ne forgesu, ke al la unuaj Esperantistoj sufiĉis la 16 reguloj de la “Plena lernolibro” de 1887.

Kiam D-ro Zamenhof dek jarojn antaŭ tiu ĉi epoka jardato estis elpensinta la internacian lingvon, ĝia gramatiko estis multe pli ampleksa. Li intence ĝin faris ĉiam pli malgranda, li reduktis ĝin je la famaj 16 reguloj, kiujn li nomis: Plena lernolibro de internacia lingvo. Li sciis, ke el tiu ĉi malgranda lernolibro kaj el la vortaro de 900 vortoj la lingvo povos elkreski. Li kreis la lingvon en tia maniero, ke ĝi estu sendependa de lia vivo.

Ĝi estas demonstra versio de la 110-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kulturo



En la almanako *La Ondo de Esperanto* aperas la plej interesaj tekstoj, publikigitaj en la samtitola novaĵretejo. Ĉi-almanake ni aperigas la intervjuojn kun la printempaj jubileantoj Ĵak Le Puil kaj Trevor Steele, kiuj premiere aperis rete je la jubileaj datoj. Niajn eminentulojn intervjuis la vicredaktoro de *La Ondo* Paweł Fischer-Kotowski, kaj iliajn portretojn pentris Niko Voloŝin.

Ni gratulas la jubileantojn!

Ĵak Le Puil kvaroble dudekjara!



La 28an de aprilo sian 80an naskiĝtagon festis Ĵak Le Puil, franca esperantisto, konata precipe pro la revuo *La KancerKliniko*, kiun li kunkreis en 1976 kaj ekde tiam redaktas. Li estas kanzonisto – aperis ses liaj kasedoj kaj diskoj en Esperanto. Kun la edzino Armela LeQuint li tradukas el la franca, pro la traduko de *Vojaĝo ĝis noktofino* en 2007 la paro ricevis la OSIEK-premion. Krome, en la 100a UK Ĵak Le Puil estis distingita de la Estraro de UEA per la Diplomo pri Elstara Agado.

Kiel kaj kial vi esperantistiĝis?

En 1958, mi legis en *Le Monde Libertaire*, organo de la anarkiista federacio, anonceton pri kurso de Esperanto kaj tuj aliĝis!

Ekde la esperantistiĝo vi estis ligita kun la SAT-medio. Dum kelkaj jaroj vi kunredaktis la junularan SAT-revuon *La Juna Penso*, sed kun viaj du kolegoj vi ekiĝis – kaj tio donis la komencon al la nuna *La KancerKliniko*, kiun vi redaktas... jam la 44an jaron, pli ol duonon de via vivo! Ĉu vi povus rakonti kio okazis en 1976 kaj kiel la afero iris poste?


Ni aperigis artikolojn pri samseksemeco, haŝiŝo ktp, kaj tio ne plaĉis al la tiama plenumkomitato de SAT! Do, kun Laŭrenco Septier kaj Jopetro Danvy ni decidis krei sendependan gazeton *La KancerKliniko*.

Ĝi estas demonstra versio de la 110-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Trevor Steele: La internacia lingvo estas parto de mia ideologio



La 14an de majo 2020 80-jariĝis Trevor Steele – aŭstraliano, unu el la plej popularaj Esperantaj verkistoj. Aŭtoro de la fama *Sed nur fragmento*, kiu troviĝas en la baza legolisto de William Auld, kaj de 12 aliaj originalaj romanoj. Aldone li verkis novelojn, vojaĝrakontojn kaj ampleksan aŭtobiografion. Ĝus lanĉiĝis lia nova romano *Paulus Fondinto* pri Sankta Paŭlo, kaj li jam laboras pri la sekva. Apud la verkado la jubileanto dum pluraj jaroj okupiĝis pri la instruado de Esperanto en kelkaj landoj, redaktis kaj kulaboris en Esperanto-gazetaro. En la jaroj 2001-2010 li estis akademiano kaj en 2002–2004 ĝenerala direktoro de UEA.

En via aŭtobiografio *Konvinka kamuflaĵo* vi rakontas pri via esperantistiĝo kaj la unua Esperanto-libro kiun vi legis. Mi malkaŝu: vi ne komencis per *La verda koro* kiel multaj, sed tuj per *La infana raso* de William Auld, nekredeble! La proverbo diras: komenco bona, ĉio bona – ĉu eble tiu via unua legaĵo iel rolis en la fakto ke vi estas nun inter niaj plej gravaj aŭtoroj?

Ne, la “elekto” de *La infana raso* ne estis mia. Herbert Platt, tiam la vendisto en la butikoj de la Brita Esperanto-Asocio, donis ĝin al mi reage al mia aroganta demando: “ĉu estas io leginda en via lingvo?!”. Tiumomente mi havas nenian ideon, ke la eposo de Auld estas eble la plej ambicia verko en Esperanto. Por mi la miraklo estis, ke helpe de vortaro kaj tabelo de la afiksoj mi sukcesis legi! Sed tiam, en 1970, mi ne suspektis, ke iam mi mem verkos en ĉi tiu lingvo.

Ĝi estas demonstra versio de la 110-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kvardek jaroj de (ne nur) Klim Samgin



Unu el la ĉefaj stratoj de ĉiu sovetunia urbo, precipe en Ruslando, estis nomita omaĝe al Maksim Gorjkij (Aleksej Maksimoviĉ Peškov, 1868-1936), sed nur malmultaj sovetianoj legis lian ĉefverkon *La vivo de Klim Samgin*, ja en la lernejoj oni preskaŭ ignoris ĝin, devigante la lernejanonj studi la propagandecan, sed literature senvaloran *La patrinon*, du kanto-poemojn, fabelojn kaj la dramon *Sur la fundo*. Sed Gorjkij sen *Samgin*, estas absurda, kiel Puŝkin sen *Eŭgeno Onegin*, Dostojevskij sen *La fratoj Karamazov*, Ŝekspiro sen *Hamleto*, aŭ Szathmári sen *Kazohinio* (ja ni estas en Esperantujo).

Mi do legis la kvarvoluman 1500-paĝan romanegon nur student-aĝe kaj komprenis, ke niaj karaj instruistoj volis savi

nin de paroladoj politike neĝustaj kaj de scenoj tro malprudaj laŭ la socialisma moralo. Mi relegis ĝin en la ĵusaj kvarantenaj semajnoj. Anstataŭ resumi ĝin, mi lasas tion al Gorjkij mem, kiu anonime verkis jenan prezentotekston por eksterlanda gazetaro:

«En sia nova romano M. Gorjkij metis al si la taskon laŭeble plene montri kvardek jarojn de la vivo de Ruslando, ekde la 1880aj jaroj ĝis la jaro 1918a. La romano havos la karakteron de kroniko, kiu notas ĉiujn plej gravajn eventojn de ĉi tiuj jaroj, kaj precipe de la jaroj de la regado de Nikolao la Dua. La romano disvolviĝas en Moskvo, Peterburgo kaj provinco, en la romano rolas reprezentantoj de ĉiuj klasoj. La aŭtoro planas montri plurajn karakterojn de rusaj revoluciuloj, religiaj sektanoj, senklasiĝintoj ktp.

En la centro de la romano estas la figuro de “revoluciulo kontraŭvola”, iĝinta tiu pro sia timo antaŭ la neevitebla revolucio, la figuro de la homo, kiu sentas sin “viktimo de la historio”. La aŭtoro opinias ĉi tiun figuron tipa. En la romano estas multaj virinoj, vico da personaj dramoj <...> Inter la epizodaj rolantoj per la volo de la aŭtoro estas la caro Nikolao II, Savva Morozov, kelkaj pentristoj kaj verkistoj, kio, laŭ la aŭtoro, parte donas al la romano la karakteron de la kroniko».

Inter ĉirkaŭ 800 rolantoj estas Klim Samgin, mediokra intelektulo, serĉanta sian identecon fone de la bolanta vivo. Apud Samgin torentas la eventoriĉa vivo, sed li – kaj pluraj el liaj konatoj – partoprenas la vivotorenton nur per komentoj, diskutoj (ankaŭ per inter-naj diskutoj) kaj disputoj, foje tre ardaĵ. Foje tre interesaj.

La romano estis verkata dum dek jaroj, sed la morto ne ebligis al Gorjkij, kiu intertempe revenis en Sovetunion, finskribi la lastajn paĝojn. Tamen eĉ nefinita, ĝi estas la plej grava socia romano, verkita en la rusa lingvo. Meze de la 1980aj jaroj en Sovetunio estis filmita 14-parta serio, reĝisorita de Viktor Titov, kun Andrej Rudenskij kiel la ĉefrolanto.

Mi esperas, ke la 15-paĝa teksto, kiun mi pene elektis post longa hezitado, ebligos al vi gustumi la etoson kaj la lingvaĵon de *La vivo de Klim Samgin*.

Aleksander Korjenkov

La vivo de Klim Samgin

(Kvardek jaroj)

Romano de Maksim Gorjkij

LA UNUA PARTO

Ĉapitro 4

<...>

Proksimiĝis fulmotondro. Nigra nubego kovris ĉion ĉirkaŭe per sia nepenetrebla ombro. La rivero malvidebliĝis, kaj la densan akvon nur en unu loko lumigis lampo en fenestro de la vilao de Telepnjova.

Makarov tre malmulte similis al tiu junulo en veltola sangoza bluzo, kiun Klim en timo kondukis sur strato¹. Ĉi tiu nesimileco vekis en li scivolemon kaj ĉagrenon.

– Vi ŝanĝiĝis, Konstanteno, – Samgin komentis malaprobe. Makarov, ridetante, demandis:

– Ĉu al bono?

– Mi ne scias.

Makarov kapjesis kaj pasigis sian manon sur la malordiĝintaj haroj.

– Al mi ŝajnas, ke mi iĝis pli trankvila. Mi konservis la impreson, kvazaŭ mi ĉasis kruelan beston kaj pafis ne sin, sed ĝin. Kaj ankoraŭ: mi ja rigardis post la angulon.

Iom silentinte, li ekrakontis penseme kaj mallaŭte:

– En la infanaĝo mi timis nenion – nek mallumon, nek tondron, nek batalojn, nek fajron de noktaj incendioj; ni loĝis en ebrula strato, kie oftis incendioj. Sed angulojn mi timis eĉ tage; okazis, ke, irante sur strato, mi devis turni post angulon, kaj al mi ĉiam ŝajnis, ke tie min atendis io, ne knaboj kiuj povus draŝi min, sed io tute nereala, io ... el fabelo. Eble tio estis ne timo, sed tro avida atendo de io malsimila al tio, kion mi vidis kaj konis. Amiko, eĉ dekjaraĝa mi sciis multon... preskaŭ ĉion, kion mi devus ne scii en tiu aĝo. Probable, mi atendis tion, kio estis ankoraŭ nekonata al mi, ne gravas, ĉu pli aŭ malpli bona, sed alia.

Rigardante al Klim per siaj ridantaj okuloj, li profunde suspiris.

– Sed nun mi trankvile rigardas post ĉiun angulon, ĉar mi scias, ke ankaŭ post la angulo, kiun oni kredas la plej terura, estas nenio.

– Mi pensas, ke la plej terura en la vivo estas mensogo! – Klim Samgin diris per nerefutebla tono.

– Jes, kaj ankaŭ stulto... Mi pensas, ke la homoj tre stulte vivas. Ili eksilentis.

– Mi iros por ankoraŭ iomete muziki, – diris Makarov.

Super la tablo ĉirkaŭ la lampo svarmis senutilaj, grizaj kreaĵetoj, ili brulvundiĝis, falis sur la tablotukon, kovrante ĝin per siaj cindroj. Klim ŝosis la terasan pordon, estingis la lumon kaj iris dormi.

Aŭskultante la bruon de l' proksimiĝanta tondro, Klim ekpensis pri io svaga, kio esprimeblis nek vorte, nek bilde. Li sentis sin en torento de io nekaptebla, en torento, kiu malrapide trais lin, sed kiu fluis ankaŭ kvazaŭ ekster lia menso, en obtuza bruado de la tondro, en frapado de maloftaj, grandaj pluvgutoj sur la fenestro, en la muzikaĵo de Grieg, kiun ludis Makarov. Avare ĵetinte kelkajn dekojn da pezaj gutoj, la nubego foriris, la tondrado iĝis mallaŭta, fora, la luno hele eklumis al la fenestro, kaj ĝia lumo kvazaŭ puŝus ĉion ĉirkaŭe, la mebloj moviĝis, la muro ŝanceliĝis. En la muelejo timeme ekbojis hundo, Makarov ĉesis pianludi, frapis la pordo, kaj aŭdiĝis mallaŭta voĉo de Ljutov. Poste ĉio mutiĝis, kaj en la glaciĝinta silento Klim ankoraŭ pli forte sentis la fluon de sia neformiĝinta penso.

Tio ne similis la angoron, kiun li spertis antaŭ nelonge, tio estis sonĝo, alarma sento de falo al iu senfundaĵo preter la kutimaj pensoj, renkonte al iu nova, kontraŭa al ili. Liaj pensoj estis ie interne de li, sed ankaŭ ili estis senvortaj kaj senfortaj kiel ombroj. Klim Samgin svage sentis, ke li devas ion konfesi al si mem, sen li ne povis kompreni, kion konkrete.

La vento fortiĝis, la pinoj bruas, sur la tegmento io obtuze fajfis; la lunlumo jen ŝiriĝis en la ĉambron, poste vanuis en ĝi, kaj ĝin denove plenigis susuroj kaj flustroj de l' makabro. La vento rapide disblovis la mallongan printempan nokton, la ĉielo malvarme verdiĝis. Klim metis la litotukon sur la kapon kaj subite pensis:

“Ja mi estas sentalenta”.

Sed ĉi tiu konjekto malaperis sen ofendi lin, kaj li denove aŭskultis, kiel tra li fluas io malpleniganta kaj senforma.

Li frue vekiĝis, sentante en la kapo iun polvon kaj pensante:

“Kial, pro kio mi ricevas tiajn humorojn?”

Kiam li en soleco trinkis teon, alvenis Turobojev kaj Varavka, vestitaj per grizaj vojaĝmanteloj. Varavka similis barelon, kaj Turobojev en la griza vasta vestaĵo ne perdis sian svelton kaj, formatinte la veltolan vestaĵon, li ŝajnis al Klim eĉ pli rekta kaj speciale seka. Liajn kaviĝintajn malvarmajn okulojn garnis blugrizaj ombroj, kaj Klim rimarkis ion tre tristan kaj malican en lia senmova rigardo.

Senpolvigante sian barbon, Varavka diris al Klim, ke la patrino petis lin morgaŭ vespere reveni en la urbon.

– Al ŝi venas tiuj muzikistoj, vi ilin konas, kaj do...

Li svage svingis sian ruĝan manon, kaj Klim preskaŭ malice pensis:

“Ŝajnas, ke Varavka kaj la patrino speciale peladas min, dezirante, ke mi laŭeble malpli longe restu kun Lidia”.

Li ankaŭ pensis, ke homoj, konataj al li, kunvenas ĉirkaŭ li kun suspektinda rapido, natura nur en teatro aŭ sur strato ĉe akcidento. Li malvolis veturi en la urbon, lin emociis la scivolemo pri tio, kiel Lidia renkontos Turobojevon.

Varavka eltiris el sia dika teko planojn, dokumentojn kaj parolis pri esperoj de liberalaj zemstvanoj je la nova caro². Turobojev aŭskultis lin kun la nepenetrebila vizaĝo, sorbante lakton el glaso. En la terasa pordo aperis Ljutov, kies haroj malsekis kaj la vizaĝo ruĝis, li anoncis, palpebrumante per siaj strabaj okuloj:

– Mi jam banis min!

Tr-ro, fr-rue, r-riske, – malaprobe diris Varavka. – Sed permesu konat... prezenti vin...

Klim rimarkis, ke Turobojev tre neglekteme premis la manon de Ljutov, tuj enpoŝigis sian manon kaj kliniĝis al la tablo rulante panbuleton. Varavka rapide formovis la manĝilojn, ekparolis pri arbaroj, marĉoj kaj sabloj, sed Klim ekstaris kaj foriris, sentante flagrantan abomenon al ĉi tiuj homoj.

Sur arbara monteto li elektis lokon, de kiu bone videblis ĉiuj vilaoj, la rivera bordo, la muelejo, la vojo al la vilaĝeto Nikonovo, proksima al la vilaoj de Varavka. Li sidiĝis sur sablon sub betuloj kaj malfermis la libron “Simbolistoj kaj dekandenculoj” de Brunetière³. Sed la legadon ĝenis la suno kaj eĉ pli la neceso vidi, kio okazas malsupre.

Barboza ruĝĉemiza kampulo, de fore videbla eta kiel pupo, kalfatris la fundon de boato, laŭtaj frapoj de lia ligna martelo klare sonis en la silento. Same pupeca kampulino, skuante sian roborandon, pelis anserojn al la rivero. Du knaboj kun fiŝistaj vergoj, unu en flava vestaĵo kaj la alia en la blua, iris sur la bordo. Jen paŝis Makarov, svingante la bantukon, li venis al la ligna irejo de la naĝejo, mallevis sian nudan piedon en la akvon, eltiris ĝin kaj skuiĝis kiel hundo. Poste li kuŝiĝis transverse de la irejo, lavis siajn kapon kaj vizaĝon kaj nehaste reiris al la vilao, viŝante siajn harojn; ŝajnis, ke li, ĉirkaŭligante sian kapon per viŝtuko, intencas forŝiri ĝin.

Varmigita de la suno, ebrigiĝita de la fortaj arbaraj aromoj, Klim ekdormis. Kiam li malfermis la okulojn, sur la riverbordo staris Turobojev kaj, senĉapeliĝinte, turnis sin, kvazaŭ je ĉarniro, al Alina Telepnjova, kiu iris al la muelejo. Kaj maldekstre, en foro, survoje al la vilaĝo super la tero kvazaŭ flugetis la svelta, blanka figuro de Lidia.

“Ĉu ŝi vidis Turobojevon? Ĉu ili interparolis?”

Li ekstaris por iri al la rivero, sed lin bremsis la sento de forta malŝato al Turobojev, al Ljutov, al Alina kiu vendas sin⁴, al Makarov kaj Lidia, kiuj ne deziras aŭ ne kapablas montri al ŝi ŝian senhontecon.

“Se mi estus same proksima al ŝi, kiel ili... Cetere, diablo kun ili...”

Li pigre sidiĝis sur la sablon, kiun la suno jam bone varmigis, kaj komencis viŝi siajn okulvitrojn, observante Turobojevon, kiu plu staris, kunpremante sian barbeton

per du fingroj kaj aerumante la vizaĝon per svingado de sia ĉapelo. Makarov venis al li, kaj ili duope ekiris al la muelejo.

“Reale, ĉiuj ĉi saĝuloj estas enuigaj. Kaj falsaj, – Samgin pensigis sin, sentante, ke lin denove ekposedas la pasintnoka humoro. – En la animo de ĉiu el ili sub la vortoj probable kuŝas io tre simpla. La diferenco inter ili kaj mi estas nur tio, ke ili sciopovas ŝajni kredantaj aŭ nekredantaj, sed mi havas nek firman kredon, nek stabilan malkredon”.

Klim Samgin ne unuafoje imagis, ke de ekstere en lin mekanike penetras multaj akraj, egalvaloraj pensoj. Ili estas kontraŭaj, kaj necesas separi de ili tiujn, kiuj plej oportunas al li. Sed kiam li provis ordigi ĉion, kion li aŭdis kaj legis, formi opiniaron, kiu servus al li kiel ŝildo kontraŭ la perforto de l' saĝuloj kaj samtempe sufiĉe klare emfazus lian personecon, – li ne sukcesis fari tion. Li sentis, ke en li nehaste turniĝas turbulo de diversaj opinioj, ideoj, teorioj, sed ĉi tiu turbulo nur malfortigas lin, sen doni ion al li, sen ensorbiĝi en la animon kaj en la menson. Jam kelkfoje lin timigis ĉi percepto de si mem kiel vakuo, en kiu senĉese bolas vortoj kaj pensoj, – bolas, sed ne varmigas. Li eĉ estis demandanta sin:

“Ja mi ne estas stulta, ĉu?”

En ĉi tiu varmega tago, kiam li, sidante sursable spektis, kiel de la muelejo revenas Turobojev kaj Makarov, kaj Alina inter ili, en lia kapo fulmis konsola konjekto:

«Mi vane maltrankviliĝas. Reale, ĉio estas tre simpla: ankoraŭ ne venis mia tempo kredi. Sed en la profundo de mia animo kreskas semo de mia vera kredo! Ĝi ankoraŭ ne klaras por mi, sed ĝia mistera forto forpuŝas de mi ĉion fremdan, ne permesante al mi alproprigi tiun. Ekzistas ideoj por mi kaj ideoj ne por mi; la unuajn mi devas trasenti, la aliajn mi devas nur koni. Ankoraŭ mi ne renkontis ideojn, kiuj estus “kemie parencaj” al mi. Kutuzov⁵ prave diris, ke por ĉiu socio ekzistas rondo de vidpunktoj kaj opinioj, kemie parencaj al ĉi tiu socio».



Klim Samgin (Bildo de Kukryniksy, 1835)


Ĝi estas demonstra versio de la 110-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Diman

de Mihail Korotkov



Nia vilaĝo Volkovo estis ne tre konvena por loĝado. Estis verŝajne nur unu kaŭzo, pro kiu homoj ĉi tie ekloĝis. Je duonkilometra distanco de Volkovo estas lago, granda kaj profunda. Iam dum magraj, malsataj jaroj viroj de l' vilaĝo nutris siajn familiojn per fiŝoj el la lago.

Sed, kiel mi jam diris, la vilaĝo ne estas konvena por loĝado. La tuta vilaĝo estas tranĉita per ravinoj. Printempe laŭ tiuj ravinoj fluas abunda akvo el ĉirkaŭaj arbaroj, la akvo ĉiujare profundigas la ravinojn, sed ĝi ankaŭ plenigas la lagon, kiu abundas je fiŝoj. Verŝajne pro tio homoj plu loĝas en ĉi tiuj ne tre konvenaj kondiĉoj.

Kaj neatendite en nia ne tre alloga vilaĝo aperis Diman. Tiam ni estis knaboj 12-14-jaraj, ĉio ĉirkaŭe estis por ni interesa. Nova homo ĉe ni ne ofte aperis, kaj, se li aperis, ĉu ni povus ne konatiĝi kun li? Diman ĝis nun restas en mia memoro kiel stranga romantika homo. Detalojn mi klarigos poste.

Do, li aperis en Volkovo, kaj tiu evento ne povis resti nerimarkebla. Li ekloĝis en dometo rande de l' vilaĝo, ekbredis dudekon da kaproj. Eĉ tio estis nekutima kaj suspektinda por niaj vilaĝanoj, inter ili kaproj ne estis ŝatataj.

Li ne ĝuis estimon de niaj vilaĝanoj, kaj havis reputacion kiel malĝusta vilaĝa mastro. Li ne havis familion, de tempo al tempo li drinkis, estante 40-jara li ne laboris en iu difinita loko. Nun, post dek jaroj, mi klare vidas, ke li ne povis ie labori. Kie? Nur ĉe iu farmisto, kiu pagis mizerajn groŝojn, aŭ en kolĥozo, kiu tute nenion pagis. Sed la vilaĝa onidiro estis ne je la flanko de Diman. Niaj homoj al kutimiĝis vivi laŭ siaj reguloj kaj komprenis nenion alian.

Sed ni, knaboj, rigardis ĉion ĉi alie, ni estis ĉiosciaj. Ni vidis, ke Diman laboris de la matenuroĝo ĝis la vesperruĝo, kiel preskaŭ neniu en la vilaĝo. Li paŝtis sian kapraron, melkis kaprinojn, preparis por ili fojnon por vintro, li faris fromaĝon, al li venis homoj aĉeti liajn produktaĵojn. Krom tio li tanis kaprajn haŭtojn kaj poste portis ilin piede dek du kilometrojn en la distriktan centron por vendado, kaj tio estis dum ĉia vetero.

Se en la vilaĝo subite malsaniĝis infano, oni venis al Diman. Li trinkigis la infanon

per kaprina lakto, per herbaj dekoktaĵoj, kaj la infano resaniĝis. Kuracado por infanoj estis senpaga, sed malgraŭ tio Diman ne akiris estimon de la vilaĝanoj.

Dum la tuta somero Diman portis sur sia dorso branĉaĵfaskojn, kultivis ion en sia legomĝardeno, transportis per manĉareto akvon el la lago por sia farmeto. Apenaŭ iu en la vilaĝo laboris pli ol Diman. Sed homoj vidas kaj aŭdas nur tion, kion ili volas vidi kaj aŭdi. “He-e, malĝusta mastro”, – diris ĉiu vilaĝano okaze preterirante lian dometon.

Kiam ni pro scivolemo unuafoje venis al li, ni adresis al li “onklo Demetrio”, ja li estis por ni tiel aĝa. Sed li tuj diris: “Nomu min simple Diman.” Ni ne kontraŭdiris, estu tiel.

Antaŭ ĉio nin frapis neordinara medio en lia dometo. Nuntempa vilaĝa domo interne neniel distingiĝas de urba loĝejo. Ĉiu vilaĝano, se li ne estas senĉesa drinkulo, havas en sia domo televidilon, molajn meblojn, kuirejon kun fridoŝranko, gasfornelo, mikroonda kuirilo. Ĉe Diman forestis ĉiuj ĉi signoj de l' civilizo. Plej simplaj mebloj el nefarbitaj tabuloj, malnova, tre malnova teleraro, herbofaskoj sub la plafono, kaj densa odoro de tiuj herboj, de lakto, de fromaĝo.

Tio nin, knabojn, ne povis ne altiri. Ankoraŭ pli altiris nin Diman mem. Kutime li estis gaja, parolema, interesa rakontanto. Ni miris: de kie tiu simpla vilaĝano scias tiom da kuriozaj, enigmoplenaj, konsternaj faktoj? Baldaŭ ni komprenis, ke Diman scias pli multe kaj scipovas rakonti pli interese, ol niaj instruistoj en la lernejo.

Pro tio la lernejo, ankaŭ ĝis nun enuiga, iĝis apenaŭ eltenebla. Ni ĝis la tagmezo pene sidadis sur la lernobenkoj, kaj posttagmeze iris al Diman aŭskulti pri Sumero, Urarto, Mezopotamio, Egiptio, Kartageno, Paska Insulo, Tenoĉtitlano, aztekoj kaj inkoj, pri aliaj malaperintaj civilizacioj, pri iliaj forgesitaj dioj kaj idoloj, regantoj kaj saĝuloj.

Rakontante, Diman seninterrompe ion faris, li ne povis toleri, ke liaj manoj estu liberaj. Li rakontis ankaŭ pri sia metio, ankaŭ tre interese. Li diris, ke acidlakton li faris laŭ recepto de iama Urarto kaj la fromaĝon – laŭ receptoj de la antikva Helenujo. Ni plezure helpis al Diman, por ni ĉio ĉi estis certe kvazaŭ tuŝo al mondaj misteroj. Kaj en aliaj aĵoj ni helpis al nia pli aĝa amiko. Ni povis, ekzemple, senŝeligigi terpomojn por lia supo, poste ĉiuj kune sidis ĉirkaŭ la tablo kaj manĝis tiun supon el unu granda telero.

Nia ĉefa somera okupo estis fiŝado. Ni provis entiri en tiun okupon Dimanon, sed li rifuzis, li ne havis tempon por sidado kun fiŝhoko sur bordo de la lago. Sed ofte nia grupeto venis kun kaptitaj fiŝoj en la dometon de Diman, ni kune kuiris fiŝsupon, kaj gaje babilante kune vespermanĝis.

Ĝi estas demonstra versio de la 110-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Rufa

de Laure Patas d'Illiers



Prae.

Suno lumigas per vertikalaj radioj longan verdan valon, kuŝantan inter du klifoj je malhela ruĝo.

Subite, en la norda ekstremaĵo de la valo, bastonoj brue frapas bastonojn kaj hurloj eĥas. La bruo alarmas la gregon en la valo. Ili nazbruas, skuas la orelojn, flaras la sudan venton. Ĉiu ekmoviĝas, malrapide, hazarde. La bruoj pli kaj pli fortiĝas. La bestoj sin proksimigas, sin turnas dorse al la bruo, mallevas la kapojn, kaŝas siajn orelojn. La granda stalono stride henas kaj ekgalopas suden, tuj sekvata de ĉiuj aliaj ĉevaloj. Hufoj obtuze martelas la teron. La ĉevalinoj puŝas siajn idojn per la muzelo. La ĉevalaro atingas la finon de la valo. Abrupte, la movanta fluo disiĝas en du partoj, ĉar profunda kavo ekmalfermiĝas en la grundo. Du ĉevaloj falas enen, kun bruego de frakasitaj branĉoj kaj akutaj blekoj. Ne haltante, la aliaj skuas la kapojn, ruladas la okulojn, blovas per la nazegoj. Ili denove kuniĝas en homogena grego, plirapidigas la galopon kaj malaperas el la valo.

Kvar siluetoj aperas sur la norda kresto. La grupo malsupreniras kaj paŝas laŭlonge de la valo. Du knaboj kaj du knabinoj, plimalpli dekkvin jaraĝaj. Ili nudaj piedoj senbrue surpaŝas la herbojn de la valo. Iliaj nigraj okuloj senĉese kontrolas la ĉirkaŭaĵojn. Ĉiu tenas, preta por ĵeti, lignan stangon kun ŝtona pinto.

Kelkaj paŝoj antaŭ la kavo, ili direktas siajn pikstangojn al ĝi kaj viciĝas ĉe la rando. La intensa sunlumo briligas la karbonigrajn hararojn kaj la okrokoloran haŭton de la nudaj korpoj. Ĉiu duonfermas la okulojn ŝirmitajn per la mano kaj rigardas la subteran mallumon. La fosaĵo profundas je staturo de homo, ĝiaj teraj parietoj estas vertikalaj kaj glataj. Funde, du ĉevaloj brue baraktas en la disrompita branĉoj. La falo rompis kruojn, ili ne kapablas stariĝi.

Knabino eligas akutan krion kaj kliniĝas, montrante per la mano ekstremaĵon de la kavo. Tie, for de la ĉevaloj, alia besto kaŝkaŭras kontraŭ la parieto. La grupo interŝanĝas kelkajn parolojn. Okazas, ke neatenditaj bestoj falas en la fosaĵojn de la klano. Lupoj, vulpoj, kaj similaj.

La grupo observas la beston en la kaptilo. Nekonata specio. Neniu felo. Sur la kapo, densa krinaro je la koloro de vulpo. Tamen tiu besto similas nek al lupo, nek al vulpo. Ĝi iom aspektas kiel homo. Senkolora homo, ĉar ĝia haŭto tiel estas kiel polmo. Unu el ĝiaj kruroj rompiĝis pro la falo kaj kuŝas tordita.



Ĉiu scias, ke kaptita besto danĝeras. Tial, antaŭ ol mal-supreniri en fosaĵon, nepras de malproksime mortigi ĉion, kio plu vivas. Unu post la alia, knabo kaj knabino celumas ĉevalon kaj finmortigas ĝin. Sube regas silento. Knabino levas sian pikstangon direkte al la nekonata besto. Tuj, knabo elgorĝe krias, surmetas sian manon sur ŝian kaj malaltigas la pinton de ŝia armilo. La knabo sidiĝas sur la randon kaj kliniĝas al la mistera estaĵo. Temas pri femalo; du palaj mamoj klare konturiĝas. La knabo lasas sian stangon kaj suben saltas en la kavaĵon. Li proksimiĝas al la ino kaj kaŭriĝas kontraŭ ŝi. La ina estaĵo levas sian kapon kaj rigardas lin. Profunde kaŝitaj sub ununura brovo, tiel vila kaj rufa kiel vulpovosto, malfermiĝas helegaj okuloj. La knabo ridetas al la nekonatino. Li etendas lian malfermitan manon al ŝi kaj prononcas kelkajn vortojn per malforta voĉo. Ŝi reciproke ridetas al li. Super la rideto, ŝia granda nazo estas kovrita per etaj rufaj makuloj. Lian brunan mincan manon ŝi tute kovras per sia fortika mano. La palhaŭta virino siavice prononcas sinsekvon de kurtaj disaj silaboj.

Noktas. Bela somera nokto, hela kaj milda. La blanka disko de la luno brilas en sennuba ĉielo. Ĝia lumo desegnas sur la stepo la siluetojn de la ledaj tendoj. Fore aŭdiĝas hurladoj de luparo, allogata per laodoro de la manĝaĵo.

La pala knabino kaj la knabo sidas flankon ĉe flanko, meze de la aliaj. La tuta klando de la homoj sidas ĉirkaŭ la fajro, en laodoro de rostita ĉevaloviando. Plenas ĉiuj ventroj. El sia parto de la hodiaŭa ĉasado, la knabo donis al sia najbarino grandan viandopecon. Rapide ŝi finglutis ĝin. Nun ŝi lekas la viandosukon, kiu fluetis sur ŝiaj blankaj brakoj.

La knabo kuŝigas la rompitan kruron de la knabino, tiel ke ĝi denove rektu. Laŭlonge li ligas longan ĉevaloston per ĉevaltendeno. Ŝi rigardas lin flegi ŝian kruron. Ambaŭ kune ridas.

Maljuna virino rigardadas ilin de fore. Delonge ŝi estras la klanon. Ĉi-vespere, ŝi anoncis, la klando decidis pri la fremda besto: ĉu anigi ŝin en la klanon, ĉu manĝi ĝin.

Tempaltempe, iu alproksimiĝas al la stranga ina besto, longe rigardas kaj flaras ŝin, kaj revenas al sia sidloko.

Ĝi estas demonstra versio de la 110-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mi ne havas horloĝon

de Paulo Sérgio Viana



Fantomoj estas nevideblaj, ankaŭ virusoj. Kaj ambaŭ hantas. La urbo estas preskaŭ senhoma, ĉiuj rifuĝas en siaj domoj. Malpli da aŭtoj surstrate. Pandemio. Kvaranteno.

Ĉiu urbo havas sian kvanton da mizeruloj, kiuj dependas de almozoj por vivi. Ili petadas sur trotuaroj, apud semaforoj, ĉe enirejoj de bankoficejoj. Nuntempe la urbo estas preskaŭ senhoma, almenaŭ en publikaj lokoj. De kiu do almozpeti? Homoj malsatas. Almozuloj estas homoj, havas stomakon kaj malsataĉas. Silente ili vagas tra la urbo kaj dormas sub markezoj. Ie kaj ie oni vidas ankaŭ infanojn vagantajn kiel hundoj. Malsataj infanoj.

Ĵurnaloj, televidstacioj kaj radiostacioj proponas, ke oni donacu nutraĵojn. Oni dismetas tabletojn kun afiŝoj: “Lasu ĉi tie vian nutrodonacon”.

Estas la deka vespere. Senbrua, iom malvarma vespero, aŭtuno jam regas. Apenaŭ zumas en la hejmo de Karlo la televidaparato. Lastaj noticoj susuriĝas en la tagofino: la viruso plivastigas sian invadon, pli da homoj mortas tute solaj, en intensflegaj hospitaloj. Kelkaj mortas antaŭ ol ili atingis taŭĝan flegadon. Televid-ĵurnaloj iom monotone listigas statistikajn ciferojn.

Karlo enuas. Ĉiam la samaj noticoj. Deprime. Preferinde enlitiĝi. Li varmigas sian kutiman laktotason kaj verŝas ĉokoladpulvoron. Je la unua gluto, sonas la doma tintilo. Karlo ekmiras, estas jam kelkaj minutoj post la deka. Kiu sonorigas?

Karlo rigardas tra la fenestro. Post la ĝardeneta ferkadro ĉifonulo vokas lin: “Sinjoro, lasu min paroli al vi”.

Ĝi estas demonstra versio de la 110-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Luisa Castro

Luisa Castro (Foz, 1966) estas verkistino en la hispana kaj en la galega. Ŝi studis lingvistikon en Madrido kaj nuntempe estas la direktoro de la Instituto Cervantes en Bordo-zo. Ŝia sola poemaro en la galega *Baleas e baleas* (Balenoj kaj balenoj, 1988), rompis la estetikon propran al la poetoj de la 1980aj jaroj kaj anoncis la novajn tendencojn de la sekvinta jardeko. En ĝi poezio proksimiĝas al prozo, sena je troa liriko, kaj montriĝas kiel kontraŭkonvencia spaco. Luisa aŭtoris ankaŭ plurajn poemarojn kaj romanojn en la hispana kaj ricevis prestiĝajn premiojn.



Mia patrino laboras en enladigejo.

Iam mia patrino diris al mi:

Amo estas lad-sardino. Ĉu vi scias
kiel oni enladigas
sardinojn?

Iam mia patrino diris al mi: amo estas enlada artaĵo.

Filino,

Ĉu vi scias, de kie vi venas? Vi venas
de mitula enladigejo.

De malantaŭ la fabriko, kie konkoj
kaj fiŝo-skatoloj putras. Neimagebla stinko kaj senutila
bluo. De tie vi venas.

Ha! mi diris, do mi estas marido.

Ne.

Vi estas ido de feritago.

Ha! mi diris,
mi estas ido de sandviĉa paŭzo.

Jes, de malantaŭe, inter la fatraso.

Tradukis el la galega **Suso Moinhos**

Foto: **José Luis Santalla**

"Si parva licet"

de Cesare Pavese



Cesare Pavese (1908-1950) estis itala romanisto, poeto, tradukisto kaj literatura kritikisto, unu el la plej gravaj italaj intelektuloj de la 20a jarcento. Doktoriginte pri beleto ĉe la universitato de Torino, li estis instruisto kaj poste kunlaboranto de eldonejo Einaudi. Multon li tradukis el britaj kaj usonaj verkistoj kiel Dickens, Joyce, Steinbeck, Dos Passos. Pro sia aparteno al la liberala grupo "Justo kaj Libero" li estis de la itala faŝista reĝimo kondamnita al trijara trudizoliĝo en malgranda vilaĝo en Kalabrio, suda Italio. Reveninte al Torino li, krom traduki, verkis romanojn, rakontojn, poemojn; de ĉi lastaj aperis la esperantigo (C. Pavese. *Poemoj*. Tr. C. Minnaja, If-koop, 1982). Pesimisto, malsukcesinto en siaj amoj kaj en la politiko (post la milito li enskribiĝis al la komunista partio) li sin mortigis en hotelo en Torino englutante ekscesan dozon da dormigiloj.

La itala originalo de ĉi tiu verko estis publikigita en la unua volumo de la tuta verkaro de Pavese (Racconti, eld. Einaudi, 1960). La latina titolo devenas el la frazo "se licas kompari malgrandaĵojn kun grandaĵo".

UNUA SCENO

Plena mateno. Adamo, juna kaj belkorpa, kun vilaj kruroj kaj larĝa brusto. Li elvenas el la groto kaj kliniĝas por pluki manplenon da ŝtonetoj. Li ilin ĵetas unuope kontraŭ la trunkon de palmo, maldekstre. Kelkfoje li maltrafas.

Adamo (*abrupte, skuiĝante*): Mi iras fiŝi.

La voĉo de Eva el la groto: Iru; ĉu necesas tion diri?

Adamo: Fakte mi ne emas iri fiŝi.

La voĉo de Eva: Stultulo.

Adamo (*rigardas ĉirkaŭen, svagsintene*): Ĉi tiun mi metas kun ĉiuj aliaj, Eva.

Silento

Kion vi gajnis dirinte al mi "Stultulo"?

(*Kolere*) Fakte, se vi daŭre traktas min tiel, iun tagon mi foriros kaj vi min neniam plu vidos. Oni eĉ ne vorton povas diri, kaj vi tuj eksaltas. Estas neceso paroli, kiun ni ambaŭ havas, ĉu ne? Vi ne scias, kion signifas esti sola. Vi neniam estis sola. Kaj vi tro ofte forgesas, ke vi estas kreita por kompanii kun mi.

La voĉo de Eva: Ja certe, sed kial vi diru al mi, ke vi iras fiŝi?

Adamo (*kliniĝas por pluki ŝtonetojn kaj tordas la buŝon, ridete*): Mi diris, tiel, por paroli, Eva.

La voĉo de Eva: Vi estas pli kara, kiam vi ne diras "tiel, por paroli".

Adamo (*ĵetas kolere la ŝtonetojn*): Nu, mi iras fiŝi.

Oni aŭdas rideton de Eva. Adamo foriras. En la senarbejo etendiĝas la freŝa trankvilo de la mateno. Pasas kapreolo kiu saltetas kaj flaras la petalojn de kelkaj plantoj, poste forsaltas maldekstren.

Reenvenas Adamo, kun la kutima mieno kaj, balanciĝante iom maldekstren, eksidas centre sur ŝtonon, turnante la ŝultrojn al la fono. Li parolas rigardante antaŭ si.

Ĉi tiu arbaro estas Eva entute. Se ĝi povus paroli, ĝi min traktus kiel ŝi. Trunkoj kaj trunkoj, folioj kaj folioj, mallumaj anguloj kiuj sekiĝas al la suno, aliaj kiuj ne sekiĝas, plena de vivo, plena de voĉoj, sed min, Adamon, ĝi prifajfas. Estas vere. Ĝi donas al mi ombron, ŝirmon, manĝaĵon kaj bonan aeron, sed intimecon nenian. Ha, Sinjoro, Sinjoro, mi min demandas, ĉu vi komprenas kion signifas esti sola.

Eva estis elveninta ĝis la sojlo de la groto kaj la flava suno ŝin lumigas de la piedoj ĝis la kolo. Ŝi estas bruna kaj muskola, kaj la vizaĝo aperas duonkaŝita de la ombro kaj de la branĉetoj de konvolvulo pendanta ĉe la enirejo. Adamo turniĝas kaj ŝin rigardas, sereniĝinta. Paŭzo.

Eva: Ĉu ĉi tiuj estas viaj preĝoj?

Adamo: Mi ne preĝis, mi parolis kun mi mem.

Eva (*suspekteme*): Vi tamen petis ion de la Sinjoro.

Adamo: Mi ne plu aŭdacas paroli kun la Sinjoro. Liaj bonfaroj estas duklingaj.

Eva (*antaŭenvenante; ŝi havas florojn enplektitajn en la haroj*): Kion signifus tio?

Adamo (*kun gajeco artifika*): La lastan fojon, kiam mi plendis, ke mi estas sola, li sendis al mi vin. (*Li moviĝas por ŝin brakumi kaj sidigi sur siajn kruojn*).

Eva (*formoviĝas kaj diras malafable*): Vi iĝas vulgara.

Adamo: Kaj vi impertinenta.

Ĝi estas demonstra versio de la 110-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

La arĝenta ekrano en la salono


Mi amas filmojn. Mi ŝatas sidi en mallumo kun fremduloj por sperti sur la arĝenta ekranu tiujn magiajn momentojn, kiujn arto speciale foje donas. Berlino, Kanno kaj Venico estas la ĉefurboj de mia mondo, la lokaj kinejoj estas iliaj ambasadejoj. Sed subite duonkuirita vesperto el Ĉinio finis ĉion. Urboj fermiĝis, la publika vivo haltis, kaj al ni estis ordonite resti hejme. Anstataŭe ekfloris distrado en la interreto. La profito de elsendo-fluaj kompanioj kvazaŭ eksplodis. Netflix kaj Amazon aktive kontribuis al la tutmondiĝo de siaj stultaĵoj.

La filmfestivalo en Kanno estis komplete nuligita por la nuna jaro, kaj tiu en Venico eble okazos, aliaj festivaloj malkovris la reton ne kiel malamikon, sed kiel aliancanon. Ili komprenis, ke necesas oferti alternativojn. Iuj festivaloj, kiel tiuj de Annecy en Francio aŭ la dana CPH:DOX pri dokumentaj filmoj, okazis komplete aŭ parte en la reto. La festivalo de Ischia en Italio ofertis la kompletan programon de 2019 por hejma spektado.

Ni estas unu

Unu el la plej okulfrapaj iniciatoj tamen venis de dudek el la plej grandaj film-festivaloj de la mondo. Dum dek tagoj ili ofertis erojn de siaj abundaj katalogoj kaj petis nur donacojn por san-organizaĵoj, batalantaj kontraŭ la koronavirusa pandemio. Estis tre specialaj tagoj, kiam homoj tutmonde ne sidis en mallumo, sed antaŭ siaj ekranoj por kune spekti filmon. La organizantoj faris sian plejblon por elekti frandaĵojn. Festivaloj estas lokoj por profundiĝi kaj trovi perlojn. Multaj filmoj aperas nur en la kadro de festivaloj kaj malaperas poste. En la historio filmoj eĉ perdiĝas kaj troviĝas nur post detala kvazaŭ detektiva laboro. (Estas eĉ tuta festivalo por tiuj filmoj: *Retrovita Kino* en Bologna. Feliĉe tiu festivalo okazos ĉi-jare.)

La Brita Film-Instituto kontribuis al *Ni Estas Unu* per barata filmo el 1928. *Ŝiraz – la tombejo de granda amo* estis produktita kune de Bharato, Germanio kaj Britio kaj reĝisorita de Franz Osten. La filmo rakontas iom larmoplene la historion de Taĝ-Mahalo surbaze de samtempa dramo. La intrigo pri forrabita princino, kiu fariĝas



la granda amo de la mogulo, estas iom magra, sed la skipo de Osten trovis grandiozajn bildojn: atako al kamelkaravano, aŭkcio de sklavoj, malicaj mensogoj en la palaco kaj eĉ (preskaŭa) ekzekuto de la heroo per elefanto. Kontraŭe al “ekzotikaj filmoj”, ĉio estis filmita surloke kaj nur en natura lumo, kaj tial *Ŝiraz* taŭgas nun ankaŭ kiel dokumento. Senbridaj emocioj de la aktoroj montras eĉ al senhontaj emocioj de nuntempa Bollywood.



Interese estis vidi kelkajn filmojn de Makao, neofta lando por normala filmspektanto kiel mi. *Urbo nomita Makao* de la reĝisorino Li Shaŭhong rakontas la historion de ludmaklerismo sur la fono de la makaa kazinokapitalismo. Post la foriro de la portugaloj prosperis tie hazardludoj, ĝis la kontraŭkoruptaj kampanjoj el Pekino malfaciligis tiujn entreprenojn. En la filmo ni sekvas la biografion de Mej Hiaŭoŭ, kiu peras neleĝajn ludojn kaj riskajn kreditojn kun la ebleco gajni (aŭ malgajni) ĉion. Iuj venkas sian ludomanion, aliaj pereas, sed gajni ankaŭ kostas.

Tute alia fono de la socio en Makao aperas en *Fratineco* (2016) de Tracy Choi. Sej ne havas specialajn kapablojn kaj klopodas vivteni sin kiel masaĝistino por plezurigi klientojn. Tri amikinoj eltenas kune la ĉiutagan vivon. La tago, kiam Ĉinio reprenis Makaon ankaŭ en tiu filmo estas punkto de turniĝo. Sej kun iama kliento ekloĝas en Tajvano post triviala kverelo kun unu el siaj amikinoj. Jarojn poste ŝi komprenas, ke la tempo en Makao estis la plej feliĉa erao de ŝia vivo. Ŝi revenas por repaciĝi kun sia estinteco.

Ĝi estas demonstra versio de la 110-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Rikolto la sepan fojon

Belarta rikolto 2019: Premiitaj verkoj de la Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio. – Novjorko: Mondial, 2019. – 136 p.

Belarta rikolto estas ĉiujara almanako de la verkoj, premiitaj en la Belartaj Konkursoj de UEA, stabile aperanta ekde 2013. Mi recenzis ĉiujn pli fruajn volumojn krom tiu de 2018 por diversaj revuoj kaj retejoj, do mi volonte traktas ankaŭ la nunan.

Poezio. Nova nomo, Evgenij Georgiev el Kazaĥio, aperis kun du premiitaĵoj. “Terra Incognita” estas vera sonetkrono, el 14+1 klasikaj sonetoj laŭ ĉiuj striktaj reguloj, rarega formo nun (mi ne memoras kiam mi lastfoje vidis tian). Ĝi ricevis la 2an premion. Kial ne la unuan? Ĉu nur pro tio, ke nun oni definitive perdis senton pri vera poezio kaj nomas “poemo” ajnan vortmiksaĵon sen ritmo, rimoj kaj senco?... Alia lia poemo “Tor fiŝkaptas”, variaĵo laŭ skandinavia mitologio, ricevis la 3an premion. Honore menciitaj estas la poemoj de la ĉino Vejo (Yida Wei) “Knabo dum rifuĝado” – aktualtema kaj emocia; kaj “Revoluciulo” de la ukrainino Tatjana Auderskaja – iom eksmoda, stile de 1930aj jaroj.

Prozo. Jesper Lykke Jacobsen, jam konata laŭ la “rikoltoj” 2016 kaj 2017, ĉi-foje gajnis la unuan premion pro “La blua arbaro”. Temas pri fora estonteco post pere de la civilizo, kiam malmultaj postvivintaj homoj sinkis al ŝtonepoka vivado – kaj trovas “artefaktojn” de la nuno. Vere animskua historio... Dua premio: Christopher Lewis, “Venko de tempo” – familia kroniko duonfabela, pri heredata horloĝo-savilo kiu “meritas ion pli valoran ol vero”. Tria premio: Ariel Bonkorpa (estus interese scii la veran nomon) el Britio kun brila satiraĵo “La plej granda tragedio”, mokanta samtempe kaj prikosmajn sciencfikciaĵojn kaj modan nun “politikan ĝustecon” – pri amo inter homo kaj aliplanedano. Egaldivide la trian premion ricevis ankaŭ Ewa Grochowska kun “Fanjo”, fabelo por plenaĝuloj – iom pli interesa ol ŝiaj plifruaj prozaĵoj, tamen ne elstara.

Por vigligi la konkurson, en 2018 oni aldonis novan subĝenron: mikronovelo (ne pli ol centvorta). La eksperimento evidentiĝis sukcesa. Oni aljuĝas nur unu “premion Paula Adúriz” (memore al la patrino de la BK-Sekretario Miguel Gutiérrez Adúriz); en 2019 ĝin ricevis Christian Rivière el Francio pro “Verŝajne”. Tiu mikronovelo plurloke aperis rete, do legu kaj juĝu mem. Vere bedaŭrindas, ke en la volumo ne aperis du pliaj mikronoveloj, ricevintaj la Honoran Mencion: “Ŝafoj” de Edmund Grimley Evans kaj “Teror-rakonto” de jam renoma Paulo Sérgio Viana. Aldoni nur unu plian paĝon kostus preskaŭ neniom, kaj la kolekto estus tiam multe pli impona.

Por la teatra branĉo en 2019 konkursis kvar verkoj, la tria premio estas aljuĝita



al “Tutkorajn bondezirojn malŝlosajn”, fantasmagoria humura komedio, verkita de “Grupo de Esperantistoj de Francilio 2018-2019”.

Pri la malforteco de la teatra ĝento en Esperanto oni skribis multfoje. Do ankaŭ ĉi tie, por sproni la verkadon, en 2018 aldoniĝis nova subĝenro: “monologo kaj skeĉo”, premio María Cuevas. En 2019 ĝin ricevis Roman Dobrzyński (Pollando) pro “Maldikigi vortaregojn!” La temo estis iam traktita de Raymond Schwartz (multe pli sukcese), do ĉi-foja kontribuado ne aspektas sprite... Same kiel pri mikronoveloj, indus publikigi ankaŭ la honore menciitajn verkojn “La tuta mondo estas teatro” de Tatjana Auderskaja kaj “Konfeso de murdunto” de Asocio Esperanto-Grenoble.

La esean branĉon ĉi-foje reprezentas du verkoj de la bone konata Suso Moinhos: “Kodado en ‘La kato en la sako’ de Mason Stuttard” (premio Luigi Minnaja) kaj “Stereotipaj komparoj en Esperanto” (2a premio). Ambaŭ skrupule kaj detale tralaboritaj, tre interesaj, kvankam legante la unuan mi rememoris la konatan aserton, ke literaturologoj nepre trovas en verko ion, pri kio la aŭtoro mem eĉ ne suspektis. Kaj la proverbeton “foje banano estas simple banano”. Sed eble mi ne sufiĉe kompetentas pri nunaj tendencoj en literaturologio...

Finas la volumon, kiel kutime, la Raporto de la Prezidanto. Miguel Fernández, talenta kaj emociplena poeto, certe ne povis skribi tion seke kaj neŭtrale. Do lia raporto legeblas kiel poemo.

Ĉi tiu volumo de *Belarta rikolto*, samkiel la plifruaj, nepre havindas kaj legindas.


Valentin Melnikov

Ni vivos! aperis en la korea lingvo

La konata korea esperantisto Lee Jungkee tradukis en la korean lingvon la dramon *Ni vivos!* de Julian Modest. En ĉi tiu libro, eldonita en Budapeŝto en 1983, la aŭtoro priskribas la lastajn jarojn el la vivo de Lidia Zamenhof. En la sama jaro la teatra trupo *Garabonciás* (Kecskemét, Hungario) prezentis ĝin kadre de la teatra programo de la 68a Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝto.

Ankaŭ poste *Ni vivos!* estis plurfoje prezentita dum Esperantaj kongresoj, festivaloj kaj renkontiĝoj en Hungario, Pollando kaj Bulgario. En la jubilea jaro 1987 ĉi tiu dramo, legita de geaktoroj de Bulgara Esperanto-Teatro, estis sonregistrita kaj eldonita en Bulgario kiel sondisko.

La korean tradukon de Lee Jungkee kune kun la originalo de Modest eldonis kiel dilgivan 134-paĝan volumon Seula Esperanto-Kulturcentro.



Georgi Mihalkov

Du almanakoj

Ne miru, ke mi prezentas la du pasintjarajn *Beletrajn Almanakojn* (№35 kaj №36) meze de la kuranta jaro. Ne mi pigris, mi ja pacience atendis ilian aperon fizikan, konsciante pri la jam kronika malfruo. Sed ankaŭ la poŝto en Kaŭno ricevis ilin nur post la Zamenhofaj Tagoj, kiam ni estis tie, kaj pro la koronavirusa pandemio ni ne plu povas viziti Litovion, kie la presitaj ekzempleroj jam dum kelkaj monatoj atendas nin. Do anstataŭ teni en la manoj la almanakojn kaj foliumi ties paperajn paĝojn, mi foliumas bitpaĝojn en mia tablokomputilo – mi konfesas, ke tio donas al mi malpli da plezuro ol la papero.


Oni diras, ke Esperantujo estas malvasta, kaj “ĉiu konas ĉiun”. Ĉu vere? Eĉ bone konata de vi esperantisto ja havas iujn flankojn pri kiuj vi ne konjektas. Tial mi plezure legis neformalajn sinprezentojn de la (ŝajne) bone konataj BA-redaktoroj kaj -eldonanto en la 35a boao: Anita Stecay, István Ertl, Jesper Lykke Jacobsen, Nicola Ruggiero, Probal Daŝgupto, Suso Moinhos kaj Ulrich Becker.

La tridek-kvina kaj la tridek-sesa numeroj de *Beletra Almanako* denove entenas originalajn kaj tradukitajn verkojn – prozon, poezion, eseojn, artikolojn, recenzojn. En la retejo de BA oni povas konatiĝi kun la kompleta enhavtabelo de ĉiu almanako, tial mi ne listigos ĉiujn nomojn/titolojn kaj notas nur tiojn, kioj pli forte kaptis mian atenton.

En la 35a BA mi atentigu vin pri la novelo *Marika* de Sten Johansson. Ĉu ne hazarde ĝi aperas antaŭ la *Vi(d)vokroniko*, aŭ: *Dek ok monatoj* de István Ertl? Mi aŭskultis fragmenton de la notaro en la pasint-septembra ARKONES per la aŭtoro legado. Tre kuraĝe, laŭ mi. La titolo reeĥas al la notaĵoj de Fabienne *Kancer-kroniko* en BA-17. La tre longa teksto estas interrompata per poeziaj interludoj, interalie, de Miguel Fernández kaj tradukitaj al Esperanto diverslingvaj poemoj de István mem.

Jorge Camacho recenzas la longtitolan verkon *Septembre, surstrate en Tokio. Granda Tertremo en la regiono Kantô 1923 – Postsono de Masakro* de Katô Naoki (tradukis Mamiya Midori). La gravecon de la libro por la nuntempo povus subteni la sola citaĵo: “Nei la fakton de la masakro signifas prepari estontan masakron”. Ĝi, laŭ Camacho, pensigu nin “pri rasismo kaj rasismaj krimoj en niaj propra lando, historio, medio, vivo”.

La 36a boao estas multe pli varia pro fasko da kontribuaĵoj al ĉiuj tradiciaj





Beletra Almanako

N-ro 36 (Oktoebro 2019) – 13a jaro

ISBN 9781595693969 / ISSN 1937-3325

Redaktis:

Suso Minahas, Anriĥa Steccay, István Erdi, Jesper Lykén Jacobsen, Probal Daŝgupto, Nicola Ruggiero

Kontribuita: Santiago Alba Rico,
Yitzorek Aradot, Heinrich Boll,
Wolfgang Benz, Achille
Campanile, Giulio Capon, Ion
Caracian, Probal Daŝgupto, Elena
Diacone, Miguel Fernández, Frank
Lappe, Harry Martinson, Carlo
Minnao, Suso Minahas, Hiroshi
Nagata, Amir Nisio, Işıl Önel,
Micaela Piovori, Niccolò Rossi,
Trevor Steele, Varlam Šalamov,
Eva Tillys, Paulo S. Viana.

Foto:
Elis Conzemont-Minobert



MONDIAL NOVJORKO

www.librejo.com

fakoj. Per la unua ĉapitro prezentiĝas la romano de Éva Tófalvy *La liberiĝo*, en kiu rolas junaj esperantistoj – geamanta paro – hungarino kaj ĉeĥo, fone de la politikaj eventoj en Meza Eŭropo, kiujn travivis la aŭtorino mem. Ankaŭ per fragmento ni konatiĝas kun ankoraŭ ne aperinta romano de Trevor Steele *La sangoruĝa flago*, kies du ĉapitroj etosigas la maltrankvilan kaj nestabilan staton en la aŭstralia Brisbano post la unua mondmilito.

En la traduko de Mikaelo Povorin aperas la bone konata rakonto *Esperanto* de Varlam Ŝalamov, kiu pasigis entute 16 jarojn en Gulagoj. Ĉiu rakonto el *Kolimaj rakontoj*, al kiu apartenas ankaŭ *Esperanto*, estas iu okazo, iu epizodo de la lagera mondo, en kiu ĉiu demando tekstas pri vivo kaj morto. En tiu mondo mensogo estas totala, ĉiuj mensogas, neniu estas tia kia li prezentiĝas, la vero estas danĝera tie kie mankas

confido kaj amikoj, kaj mensogo povas esti sava: [nomos sin] ĉarpentisto kvankam vi estas juristo, veterinaro – kvankam vi estas konanto de Esperanto, – kaj vi ricevos ankoraŭ unu tagon da vivo, tagon en varmo...

Originala poezio ĉeestas per kontribuoj de Nicolino Rossi kaj Miguel Fernández. Carlo Minnaja eseas pri la kvindek jaroj de la literatura rondo “La Patrolo”. Pliaj valoraj tekstoj enestas en BA-36, inkluzive de funda recenzo pri la dulingva *La homa lingvo / Human Language* de William E. Collinson, verkita de Probal Daŝgupto.

Halina Gorecka

Ĝi estas demonstra versio de la 110-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Libro de UN pri KOVIM-19 aperis ankaŭ en Esperanto

Ĉina Esperanto-Ligo, Universala Esperanto-Asocio kaj Unesko (Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de Unuiĝintaj Nacioj) partoprenis en esperantigo kaj eldono de la multlingva bildlibro *Vi estas mia heroo* pri la tutmonda batalo kontraŭ KOVIM-19 (COVID-19). Nun la libro en Esperanto kaj aliaj pli ol kvindek lingvoj legeblas en la retejo de Inter-Agenteja Konstanta Komitato de UN (Unuiĝintaj Nacioj).

La libro taŭgas por geknaboj, kiuj aĝas inter ses kaj dek unu jaroj. Per la vojaĝo de la knabino Sara kaj la mirakla besto Ario la libro celas diskonigi al infanoj kiel protekti sin mem, familianojn kaj amikojn kontraŭ infektiĝo de COVID-19 kaj kiel trakti negativan humoron.

La libro *Vi estas mia heroo* estas lanĉita de Inter-Agenteja Konstanta Komitato pri Mensa Sano kaj Psikologia Subten-Konsila Grupo en Kriza Situacio kaj kune eldonita de pli ol 50 organizoj inkluzive de la Monda Organizo pri Sano kaj la Infana Fonduso de UN.

La Esperanta versio estas tradukita de la rusa esperantisto Andrej Peĉĉenkin. Bonvolu elŝuti kaj legi la libron ĉe: <https://tinyurl.com/y9v6x9mj>

Gao Shuyuan

Laŭ *El Popola Ĉinio*



Do Sara saltis sur la dorso de Ario. Ili kune flugis en la noktan ĉielon tra la dormĉambra fenestro. Ili ekflugis al la steloj salutante la lunon.

La Ondo de Esperanto: duonjaro da ĉiutaga informado

En nia novaĵretejo dum la unua jarduono 2020 ĉiutage aperis almenaŭ unu nova teksto. Ĉi tiu retejo estis lanĉita la 2an de septembro 2010 kiel *La Balta Ondo*. Ekde tiam en ĝi aperis 2 mil 219 tekstoj, averaĝe kvar aŭ kvin tekstoj ĉiusemajne. Ilin akompanas 2 mil 641 komentoj.

La 1an de januaro 2020 nia novaĵretejo ŝanĝis sian nomon al *La Ondo de Esperanto*. Iom post iom ni modernigis la aspekton de la retejo, kaj fine de januaro ni instalis novan vizitkalkulilon, laŭ kiu la plej ofte vizitita aŭiŝo estas ne aktualaĵo, sed eseo de la redaktoro de *La Ondo* pri la artikolo “Prudento aŭ Kredo?” de Lev Tolstoj, kies aperigo pretekstis la fermon de la unua Esperanta gazeto. Ĝi estas legita 1088 fojojn. Vidu la plejliston de la dek plej legitaj tekstoj ekde februaro 2020:

1088. Korĵenkov A.: “Antaŭ 125 jaroj: Tolstoj kaj la unua Esperanta gazeto”

1071. Gorecka H., Korĵenkov A.: “Sen Rodin sekvis sian edzinon”

1013. Gorecka H., Korĵenkov A.: “Júlia Sigmond forpasis”

963. Belov S.: “La pandemio kaj la homaro: konkludoj de la viruso”

786. Reza Kheirkhah: “Staĝo en Tajvano: Malgraŭ la koronaviruso”

768. Louis Beaucaire: “Kiel mi fariĝis kunfondinto de UEA”

746. Korĵenkov A.: “Ho, mia kor’, ne batu maltrankvile...”

724. Korĵenkov A.: “Jubileoj kaj memordatoj en februaro 2020”

721. Gorecka H., Korĵenkov A.: “Parlamenta medalo por Povilas Jegorovas”

710. “Alvoko de UEA por solidareco al esperantistoj en Uvira per Espero”

La retejo estas ĉe <https://sezonoj.ru/>

Subtenu ĝin per abonoj kaj donacoj: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Halina Gorecka

Aleksander Korĵenkov

Ĝi estas demonstra versio de la 110-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>